

Frederiko Engelso

La evoluo de la socialismo de utopio al scienco



**Frederiko Engelso**

**La evoluo de la socialismo de  
utopio al scienco**

**Monda Asembleo Socia (MAS)**

Frederiko Engelso  
La evoluo de la socialismo de utopio al scienco

elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2012

ISBN 978-2-918300-65-6

Tiun ĉi libron la tradukinto dediĉas al  
Gerardo Hernández Nordelo,  
Ramón Labañino Salazar,  
Antonio Guerrero Rodríguez,  
Fernando González Llort kaj  
René González Sehwerert<sup>1</sup>

- 
- 1 La Kvin Kubanoj - aŭ Kuba Kvinopo -, kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraligi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn kaj, en junio 1998, delegacio de la FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol dufoje vivolonga malliberejo. Pri tiu justicskandalo vidu Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo. Esperantigoj el la hispana kaj la franca lingvoj de diversaj MAS-anoj, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

# Enhavo

Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco.....	7
Karlo Markso: [Antaŭparolo al la franca eldono (1880)].....	8
Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la unua eldono [en la germana lingvo (1882)].....	11
1.....	14
2.....	26
3.....	33
Frederiko Engelso: La markio.....	51
Notoj de la tradukinto.....	66

# Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco

Verkita de januaro ĝis meze de marto 1880.

Aperinta unue en franca lingvo en la revuo „La Revue socialiste”, n-ro 3, 4 kaj 5 de la 20-a de marto, 20-a de aprilo kaj 5-a de majo 1880 kaj samjare kiel broŝuro sub la titolo „Socialisme utopique et socialisme scientifique”.

La unua eldono en germana lingvo aperis 1882 en Hottingen-Zuriko. Laŭ la kvara, kompletigita eldono, Berlino, 1891.

Esperanta traduko el la germana laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlino, volumo 19, 4-a eldono, 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 177 - 228, laŭ la reta versio estigita 1999-07-18.

## **Karlo Markso: [Antaŭparolo al la franca eldono (1880)]**

verkita ĉa. la 4-a / 5-a de majo 1880.

Laŭ la manskribo el la franca [en la germanan].

*Esperantigita el la germana laŭ Friedrich Engels: „Die Entwicklung des Sozialismus von der Utopie zur Wissenschaft”, en: Karl Marx/Friedrich Engels: Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlino, Volumo 19, 4-a eldono, 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 181-185, en la reta versio estigita 1999-07-18.*

La paĝoj de tiu ĉi broŝuro estis unue publikigitaj en tri artikoloj de la „Revue socialiste” kiel traduko el la plej nova laboraĵo de Engelso „La revolucio de la scienco”<sup>2</sup>

Frederiko Engelso, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la moderna socialismo, konatiĝis en 1844 per siaj „Konturoj de kritiko de la nacia ekonomio”, kiuj aperis unue en la „Germanaj-Francaj Jarlibroj”, kiujn Markso kaj Rüge eldonis en Parizo. En la „Konturoj” formuliĝis jam kelkaj ĝeneralaj principoj de la scienca socialismo. En Manĉestro, kie Engelso poste vivis, li verkis (en la germana lingvo) „La situacio de la laboranta klaso en Anglio” (1845), grava verko, kiun Markso laŭ la merito honoris. Dum sia unua restado en Anglio – kiel ankaŭ poste en Bruselo – li estis kunlaboranto de la „Northern Star”, la oficiala organo de la socialisma movado, kaj de la „New Moral World” de Roberto Oveno<sup>3</sup>.

Dum sia restado en Bruselo li kaj Markso fondis la komunistan *Germana Laborista Asocio*<sup>4</sup> kiu interrilatis kun la flandra kaj la valonaj laboristaj kluboj; kaj ambaŭ eldonis en Bornstedt la „Germana-bruselan gazeton”<sup>5</sup>. Laŭ invito de la germana komitato de la *Ligo de la Justuloj*<sup>6</sup> (en Londono) ili aniĝis al tiu ligo, kies fondinto estis Karl Schapper, post sia fuĝo el Francio kiel partopreninto en la konspirado de Blankio<sup>7</sup> en 1839. Post forigo de

---

2 En la eldono subskribita de Paul Lafargue sekvas la aldono: „Ili estas kontrolitaj de la aŭtoro, kiu faris en la tria parto diversajn aldonojn, por komprenigi al la franca leganto la dialektikan evoluon de la ekonomiaj fortoj de la kapitalisma produktado.”

3 Originale: Robert Owen [rôbet óüen]. -vl

4 Originale: Deutscher Arbeiterverein. -vl

5 Originale: Deutsche-Brüsseler-Zeitung. -vl

6 Originale: Bund der Gerechten. -vl

7 Originale: Blanqui. -vl



la formoj kutimaj en sekretaj organizaĵoj, la ligo estis transformita en la internacian Ligon de la Komunistoj. Tamen la ligo, sub la donitaj cirkonstancoj, devis resti sekreta antaŭ la registaroj. En 1847 Markso kaj Engelso, en la internacia kongreso de la ligo en Londono, estis taskitaj redakti la „Manifeston de la Komunista Partio”, kiu estis rekte antaŭ la februara revolucio publikigita kaj tradukitaj en preskaŭ ĉiujn eŭropajn lingvojn.<sup>8</sup> En la sama jaro ili partoprenis en la fondo de la Brusela Demokratia Societo, publika kaj internacia unuiĝo, en kiu renkontiĝis reprezentantoj de la burĝaj radikaluloj kaj de la socialistaj laboristoj.

Post la februara revolucio Engelso fariĝis unu el la redaktistoj de la „Nova Rejn-Gazeto”<sup>9</sup>, fondita en la jaro 1848 de Markso en Kolonjo kaj en majo 1849 subpremita de la prusa ŝtatrenverso. Post kiam Engelso partoprenis en la ribelo de Elberfeld, li partoprenis en la badena kampanjo kontraŭ la prusoj (junio kaj julio 1849) kiel adjutanto de Willich, kiu estis tiam kolonelo de ribel-bataliono.

En Londono li estis en 1850 kunlaboranto de la „Nova Rejna Gazeto. Politika-ekonomia revuo”<sup>10</sup>, eldonata de Markso kaj presata en Hamburgo. En ĝi Engelso publikigis unuafoje la laboraĵon „La germana kamparana milito”, kiu 19 jarojn poste aperis en Lepsiko kiel broŝuro kaj ricevis tri eldonojn.

Post la refortiĝo de la socialista movado en Germanio, Engelso verkis la plej gravajn artikolojn, kiuj aperis en la „Volksstaat” kaj en la „Vorwärts”, el kiuj la plej multaj estis represitaj kiel flugfolioj, ekz-e „Socialaj aferoj el

---

8 En la eldono subskribita de Lafargue sekvas la aldono: „La Komunista Manifesto’ estas unu el la plej valoraj dokumentoj de la moderna socialismo. Ĝi restas ankaŭ hodiaŭ unu el la plej fortaj kaj plej klaraj prezentadoj de la evoluo de la burĝa socio kaj de la elformiĝo de la proletaro, kiu devas ĉesigi la kapitalisman socion; ĉi tie, kie ankaŭ en ‘Mizero de la filozofio’ [en la franca: „Misère de la philosophie”, en Esperanto: Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; Pri J. B. Prudono. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia, (MAS), 2009. -v1] de Markso, aperinta jaron antaŭe, oni trovas por la unua fojo la teorion de la klasbatalo klare formulita.”

9 Originale: Neue Rheinische Zeitung. -v1

10 Originale: Neue Rheinische Zeitung. Politisch-ökonomische Revue. -v1

Ruslando” „Prusa alkoholo en la germana parlamento”, „Pri la loĝ-demando”, „La bakunistoj ĉela laboro” ktp.<sup>11</sup>

Post transloĝiĝi en 1870 de Manĉestro al Londono, li fariĝis membro de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacio, kiu taskis lin pri korespondado por Hispanio, Portugalio kaj Italio.

La lastan serion de artikoloj, kiun li ironie nomis „La revolucio de la scienco fare de s-ro Eŭgeno Duringo”<sup>12</sup> (responde al la supozataj novaj teorioj de s-ro Eŭgeno Duringo pri la scienco ĝenerale kaj pri la socialismo speciale), li sendis al la „Vorwärts”. Tiu serio estis kunigita en volumon kaj havis grandan sukceson ĉe la germanaj socialistoj. Ni prezentas en tiu ĉi broŝuro la plej trafajn eltiraĵojn el la teoria parto de tiu libro, kiuj iel konsistigas enkondukon en la sciencajn socialismon.

---

11 Oficiale resp. „Soziales aus Rußland”, „Preußischer Schnaps im deutschen Reichstag”, „Zur Wohnungsfrage”, „Die Bakunisten an der Arbeit”. -vI

12 Originale: „Herrn Eugen Dührings Umwälzung der Wissenschaft”. -vI

## ***Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la unua eldono [en la germana lingvo (1882)]***

La sekva verketo estiĝis el tri ĉapitroj de mia laboraĵo „La revolucio de la scienco fare de s-ro E. Duringo”, Lepsiko 1878. Mi kunmetis ilin por mia amiko Paul Lafargue por tradukado en la francan kaj aldonis kelkajn aldonaĵojn. La franca traduko, kiun mi kontrollegis, aperis unue en la „Revue socialiste” kaj poste memstare sub la titolo „Socialisme utopique et socialisme scientifique”, Parizo, 1889. Traduko en la polan, laŭ la franca traduko, ĵus aperis en Genevo kun la titolo „Socyjalizm utopijny a naukowy”, imprimerie de l'Aurore, Genève 1882.

La surpriza sukceso de la lafarga traduko en la franclingvaj landoj kaj speciale en Francio mem devis trudi al mi la demandon, ĉu germana separa eldono de tiuj tri ĉapitroj eble ankaŭ utilis. Tiam la redaktejo de la zurika „Sozialdemokrat” informis min, ke ene de la germana socialdemokrata partio oni esprimas ĝenerale la deziron pri eldonado de novaj propagandaj broŝuroj, kaj demandis min, ĉu mi pretus dediĉi tiujn tri ĉapitrojn al tio. Kompreneble mi konsentis kaj disponigis mian laboraĵon.

Sed tiu origine tute ne estis verkita por la rekta popol-propagando. Kiel unue pure scienca laboraĵo povus taŭgi por tio? Kiaj ŝanĝoj laŭ formo kaj enhavo estis necesaj?

Koncerne la formon, nur la multaj fremdvortoj povis kaŭzi dubojn. Sed jam Lasalo<sup>13</sup> en siaj paroladoj kaj propagandaj skribaĵoj ne ŝparis fremdvortojn, kaj miascie oni ne plendis pri tio. De tiam niaj laboristoj legis gazetojn multe pli kaj multe pli regule kaj pro tio samgrade familiariĝis kun fremdvortoj. Mi limigis min al tio, forigi ĉiujn nenecesajn fremdvortojn. Ĉe la neeviteblaj mi rezignis pri aldono de tiel nomataj klarigaj tradukoj. La neeviteblaj fremdvortoj, plej ofte ĝenerale akceptitaj sciencaj-teĥnikaj esprimoj, ĝuste ne estus neeviteblaj, se ili estus tradukeblaj. La tradukado do falsas la sencon; anstataŭ klarigi, ili konfuzas. Parola informado helpas tie multe pli.

La enhavo, male, kiel mi kredas povi aserti, faros malmultajn malfacilaĵojn al la germanaj laboristoj. Se entute, nur la tria sekcio estas malfacila, sed por la laboristoj, kies ĝeneralajn vivkondiĉojn ĝi resumas, multe malpli ol por la „kleraj” burĝoj. Ĉe la multnombraj klarigaj aldonoj, kiujn mi faris

---

13 Originale: Lasalle – Ferdinand Lassalle [férdinant lasál]. -vI

Ĉi tie, mi pensis efektive malpli pri la laboristoj ol pri „kleraj” legantoj; ekze pri uloj kiel la s-ro deputito von Eynern, la s-ro Sekreta Konsilisto Heinrich von Sybel kaj homoj kiel Treitschke, kiuj estas regataj de la nerezistebla impulso ĉiam denove prezenti nigre-surblanke sian teruran nescion kaj la el ĝi rezultantan kolosan miskomprenon de la socialismo. Se Donkiĥoto uzas sian lancon kontraŭ ventmueliloj, tio estas laŭ liaj ofico kaj rolo; sed al Sanĉo Panso ni tute ne povas permesi ion tian.

Tiaj legantoj ankaŭ miros en skizita evoluhistorio de la socialismo renkonti la kantian-laplasan kosmogonion, la modernan natursciencan kaj Darvinon, la klasikan germanan filozofion kaj Hegelon. Sed la scienca socialismo estas ja esence germana produkto kaj povis estiĝi nur ĉe la nacio, kies klasika filozofio tenis viva la tradicion de konscia dialektiko: en Germanio.<sup>14</sup> La materiisma historia percepto kaj ĝia specifa aplikado al la moderna klasbatalo inter proletaro kaj burĝaro eblis nur pere de la dialektiko. Kaj kie la pedantuloj de la germana burĝaro dronigis la memoron de la grandaj germanaj filozofoj kaj la de ili portitan dialektikon en la marĉon de enuiga eklektismo, tiom, ke ni devas alvoki la modernan natursciencan kiel atestanton pri tio, ke la dialektiko efikas en la realo – ne germanaj socialistoj fieras pri tio, ke ni devenas ne nur de Sentsimono, Furiero kaj Oveno<sup>15</sup>,

---

14 (Piednoto de Frederiko Engelso:) „En Germanio” estas skriberaro. Devas teksti: „ĉe la germanoj”. Ĉar same kiel unuflanke la germana dialektiko estis nepreterirebla ĉe la genezo de la scienca socialismo, same nepreterirebla estis ĉe tio la evoluantaj ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj de Anglio kaj Francio. La postrestinta ekonomia kaj politika evoluŝtupo de Germanio, komence de la 1840-aj jaroj ankoraŭ pli ol hodiaŭ, povis produkti en la plej bona okazo socialismajn karikaturojn (kp. „Komunista Manifesto”, III, 1-a ĉap.: „La germana aŭ 'vera' socialismo” [Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 201, p. 74 – 76. -v1]. Nur per tio, ke la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj produktitaj en Anglio kaj Francio estis submetitaj al la germana-dialektika kritiko, nur tiam eblis atingi realan rezulton. Tiurilate la scienca socialismo do ne estas ekskluzive germana, sed same internacia produkto. [Tiu ĉi piednoto estis enmetita de Engelso en la trian germanan eldonon de 1883.]

15 Originale resp. Saint-Simon, Fourier, Owen. -v1

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la unua eldono [en la germana lingvo (1882)]

sed ankaŭ de Kantio, Fiĥto kaj Hegelo<sup>16</sup>.

Londono, la 21-an de septembro 1882

*Frederiko Engelso*

---

16 Originale resp. Kant, Fichte, Hegel. -vl

# 1

La moderna socialismo estas laŭ sia enhavo unue la produkto de percepto, unuflanke de la en la hodiaŭa socio regantaj klasaj kontraŭecoj de posedantoj kaj senposeduloj, de kapitalistoj kaj dunglaboristoj, aliflanke de la en la produktado reganta anarĥio. Sed laŭ sia teoria formo ĝi aperis komence kiel pluigita, laŭdire pli konsekvenca daŭrigo de la principoj starigitaj de la grandaj francaj kleriguloj de la 18-a jarcento. Kiel ĉiu nova teorio, ĝi devis unue eliri ĉe la donita pensmaterialo, kvankam ĝia radiko troviĝis en la materiaj ekonomiaj faktoj.

La grandaj homoj, kiuj en Francio klarigis la kapon por la venonta revolucio, elpaŝis mem ekstreme revolucie. Ili ne agnoskis kian ajn eksteran aŭtoritaton. Religio, naturpercepto, socio, ŝtata ordo, ĉio estis submetata al plej senindulga kritiko; ĉio devis pravigi sian ekzistadon antaŭ la juĝejo de la racio aŭ rezigni sian ekziston. La pensanta juĝkapablo estis metita kiel sola mezurilo al ĉio. Tiu estis la tempo, kiam, kiel Hegelo diras, la mondo metiĝas sur la kapon<sup>17</sup>, unue en la senco, ke la homa kapo kaj la per ĝia pensado trovitaj principoj pretendis esti konsiderataj la bazo de ĉia homa agado kaj sociigo; sed poste ankaŭ en la kroma senco, ke la realo, kiu kontraŭdiras tiujn principojn, estis efektive inversigita de supre ĝis malsupre. Ĉiuj ĝistiamaj sociaj kaj ŝtataj formoj, ĉiaj tradiciaj ideoj estis ĵetitaj en la rubujon kiel neraciaj; la mondo ĝis tiam lasis sin gvidi nur de antaŭjuĝoj; ĉio pasinta meritis nur kompaton kaj malestimon. Nur nun estiĝis la taglumo, la regno de la racio; de nun la superstiĉo, la maljusteco, la privilegio

---

17 Jen la teksto pri la Franca Revolucio: „La penso, la nocio de la rajto [en la germana, la nocioj de *rajto* kaj de *juro* havas unu solan terminon: *Recht* – do, rajto / juro. -vl] *unufrape* respektigis sin, kaj kontraŭ tio la malnova strukturo de maljusteco ne povis rezisti. En la penso de la rajto / juro do nun stariĝis konstitucio, kaj sur tiu fundamento estontece ĉio devis baziĝi. De kiam la Suno staras ĉe la firmamento kaj la planedoj ĉirkaŭiras ĝin, tio ankoraŭ ne estis vidita, ke la homo starigas sin sur la kapon, tio estas sur la penson kaj konstruas la realon laŭ tiu. Anaksagoro diris la unua, ke la nŭs, la racio, regas la mondon; sed nur nun la homo venis al la ekkono, ke la penso regu la spiritan realon. Do, tio estis *majesta sunleviĝo*. Ĉiuj pensantaj estuloj kunfestis tiun epokon. Nobla emocio regis tiutempe, *entuziasmo de la spirito traskuis la mondon*, kvazaŭ nur nun okazus la repaciĝo de la dieco kun la mondo. (Hegelo: „*Philosophie der Geschichte* [Filozofio de la historio]”, 1840, p. 535) – Ĉu ne estas urĝa tempo, movi kontraŭ tiaj komundanĝeraj instruoj de ŝtatenverso de la tiama profesoro Hegelo la leĝon kontraŭ socialistoj?

kaj la subpremado estu forŝovataj de la eterna vero, la eterna justeco, la en la naturo baziĝanta egaleco kaj la necedebaj homrajtoj.

Ni scias nun, ke tiu regno de la racio estis nenio alia ol la idealigita regno de la burĝaro; ke la eterna justeco trovis sian realigon en la burĝa jursistemo; ke la egaleco finfine signifis la burĝan egalecon antaŭ la leĝo; ke unu el la plej esencaj homrajtoj estis proklamita – la burĝa proprieto; kaj ke la racio-ŝtato, la rusoa soci-traktato realiĝis kaj povis realiĝi nur kiel burĝa, demokratia respubliko. Same kiel ĉiuj iliaj antaŭuloj la grandaj pensistoj de la 18-a jarcento ne povis transiri la barojn, kiujn ilia propra epoko starigis al ili.

Sed apud la kontraŭeco de la feŭda nobelaro kaj la burĝaro – kiu elpaŝis kiel reprezentanto de la tuta cetera socio – ekzistis la ĝenerala kontraŭeco de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, de riĉaj nenifaruloj kaj laborantaj malriĉuloj. Ĝuste tiu cirkonstanco ebligis al la reprezentantoj de la burĝaro prezentiĝi kiel reprezentantoj ne de aparta klaso, sed de la tuta suferanta homaro. Eĉ pli. Ekde sia origino la burĝaro ekzistis kun sia kontraŭo: kapitalistoj ne povas ekzisti sen dunglaboristoj, kaj en la sama proporcio kiel la mezepoka gilda civitano evoluis al la moderna burĝo, en la sama proporcio ankaŭ la gilda submajstro kaj negilda taglaboristo evoluis al proleto. Kaj kvankam ĝenerale la burĝaro povis pretendi en la batalo kontraŭ la nobelaro reprezentante samtempe ankaŭ la interesojn de la diversaj laborantaj klasoj de tiu epoko, tamen, dum ĉia granda burĝa movado aperis la memstaraj moviĝoj de tiu klaso, kiu estis la pli aŭ malpli evoluanta antaŭulo de la moderna proletaro. Tiel en la epoko de la germana milito de reformacio kaj de la kamparana milito la rebaptistoj kaj Tomaso Muncero<sup>18</sup>; en la granda angla revolucio la Levellers; en la Granda Franca Revolucio Babeuf. Apud tiuj revoluciaj ribeloj de ankoraŭ nepreta klaso okazis respektivaj teoriaj manifestacioj; en la 16-a kaj 17-a jarcentoj la utopia priskribo de idealaj sociaj kondiĉoj; en la 18-a jam rekte komunismaj teorioj (Morelly kaj Mably).

---

18 Originale: *Thomas Müntzer* [tómas mjúncer]. Engelso konsideras la jam de Muncero faritajn provojn, en Germanio tempe de la kampula milito kaj de la reformacio, krei komunisman ordon, kiel la komencojn de „aganta komunisma movado” (MEW 1, p. 488s., 7, p. 352sj, laŭ Klaus, Georg kaj Buhr, Manfred: *Philosophisches Wörterbuch*, 8-a kor. eld., das europäische buch, Berlino, 1971, vol. 2, p. 1012.). -vl

La postulo de egaleco jam ne estis limigita al la politikaj rajtoj, ĝi devis etendiĝi ankaŭ al la socia situacio de la unuopuloj; oni celis forigi ne nur la klasajn privilegiojn, sed la klasajn diferencojn mem. Asketa komunismo, kiu fiigis ĉian ĝuadon de la vivo kaj kiu eliris de Sparto estis do la unua aperformo de la nova instruo. Poste sekvis la tri grandaj utopiistoj: Sentsimono, ĉe kiu la burĝa tendenco ankoraŭ konservis certan validecon apud la proleta; Furiere kaj Oveno, kiu, en la lando de la evoluinta kapitalisma produktado kaj sub la impreso de la kontraŭecoj kiujn tiu kreis, sisteme disvolvis siajn proponojn forigi la klasajn diferencojn en rekta daŭrigo de la franca materiismo.

Al ĉiuj tri estas komune, ke ili ne elpaŝas kiel reprezentantoj de la interesoj de la intertempe historie produktita proletaro. Kiel la klerigistoj ili volis liberigi ne unue certan klason, sed samtempe la tutan homaron. Kiel tiuj ili volis enkonduki la regnon de la racio kaj de la eterna justeco; sed ilia regno estas ege malsama al tiu de la klerigistoj. Ankaŭ la burĝa mondo, starigita laŭ la principoj de tiuj klerigistoj, estas malracia kaj maljusta kaj do iras en la rubujon de forĵetendaĵoj same kiel la feŭdismo kaj ĉiuj antaŭaj sociaj formacioj. La fakto, ke la realaj racio kaj justeco ĝis nun ne regis en la mondo, venas nur de tio, ke oni ne ĝuste ekkonis ilin. Mankis ĝuste la genia unuopulo, kiu nun elpaŝis kaj ekkonis la veron; ke li aperis nun, ke li ekkonis la veron ĝuste nun, tio ne estas okazaĵo neeviteble sekvanta el la kunteksto de la historia evoluo, sed pura bonsorta hazardo. Li povintus naskiĝi ankaŭ eble 500 jarojn pli frue kaj tiam ŝparintus al la homaro 500 jarojn da eraro, da bataloj kaj da suferoj.

Ni vidis, ke la francaj filozofoj de la 18-a jarcento, la preparantoj de la revolucio, alvokis la racion kiel solan juĝiston super ĉio ekzistanta. Racia ŝtato, racia socio starigendis, ĉio, kio kontraŭdiris la eternan racion, estis senkompatate forigota. Ni vidis ankaŭ, ke tiu eterna racio estis en la realo nenio alia ol idealigita juĝkapablo de la meza civitano<sup>19</sup> ĝuste tiam evoluanta al burĝo. Kiam la Franca Revolucio estis realiginta tiun racion socian kaj tiun racion ŝtaton, tiuj novaj institucioj, kiom ajn raciaj ili estis kompare kun la antaŭaj kondiĉoj, montriĝis tute ne absolute raciaj. La racia ŝtato komplete frakasiĝis. La rusoa socitraktato realiĝis en la tempo de hororo, el kiu la burĝaro, malcertiĝinta pri sia propra politika kapablo, fuĝis unue en la

---

19 En la originalo: „des Mittelbürgers”. -vl



korupton de la direktorio kaj fine sub la protekton de la napoleona despotismo. La promesita eterna paco transformiĝis en senfinan konkermiliton. La racia socio ne fartis pli bone. La kontraŭeco de riĉuloj kaj malriĉuloj, anstataŭ dissolviĝi en ĝenerala prospero, akriĝis per la forigo de gildaj kaj aliaj privilegioj, kiuj provizore transpontis ĝin, kaj per la forigo de la ekleziaj institucioj de bonfarado, kiuj mildigis ĝin; la „libereco de la proprieto” el feŭdaj ligiloj, kiu nun fariĝis la vero, montriĝis por la etburĝo kaj etkampulo kiel la libereco vendi tiun etan proprieton subprematan de la superforta konkurenco de la grandkapitalo kaj de la granda grundposedo al ĝuste tiuj grandsinjoroj kaj tiel por la etburĝo kaj etkampulo transformiĝi en la liberecon *el* proprieto; la supreniro de la industrio sur kapitalisma bazo faris malriĉecon kaj mizeron de la laborantaj amasoj vivkondiĉo de la socio. La kontanta pago fariĝis pli kaj pli, laŭ la esprimo de Carlyle, la sola ligilo de la socio. La nombro de krimoj kreskis de jaro al jaro. Dum antaŭe la feŭdaj malvirtoj, kiuj senĝene diboĉis dum la hela tago, estis, kvankam ne neniigitaj, tamen provizore ŝovitaj en la fonon, nun tiuj burĝaj malvirtoj, kiuj antaŭe estis praktikataj nur silente, des pli ekfloris. La komerco evoluis pli kaj pli al trompado. La „frateco” de la revolucia slogano realiĝis en la ĉikanoj kaj la envio de la konkurencbatalo. En la lokon de la perforta subpremato paŝis la korupto, en la lokon de la spado, la unua socia potenclevilo, la mono. La rajto je la unua punkto transiris de la feŭda sinjoro al la burĝaj fabrikistoj. La prostituado etendiĝis en ĝis tiam ne vidita mezuro. La geedzeco mem restis nun kiel antaŭe la leĝe agnoskita formo, oficiala vualo de prostituado, kaj krome kompletiĝis per abunda adulto. Mallonge, kompare kun la pompaj promesoj de la klerigistoj, la sociaj kaj politikaj institucioj starigitaj per la „venko de la racio” pruviĝis kiel amare seniluziigaj tordobildoj. Mankis jam nur la homoj, kiuj konstatis tiun seniluziigon, kaj tiuj venis kun la jarcentŝanĝiĝo. En 1802 aperis la Ĝenevaj leteroj de Sent-simono; 1808 aperis la unua verko de Furiere, kvankam la bazo de lia teorio ekzistis jam antaŭ 1799; la 1-an de januaro 1800 Roberto Oveno transprenis la gvidon de *New Lanark*.

Sed tiutempe la kapitalisma produktadmaniero, kaj kun ĝi la kontraŭeco de burĝaro kaj proletaro, estis ankoraŭ tre subevoluinta. La granda industrio, en Anglio ĵus estiĝinta, estis en Francio ankoraŭ ne konata. Sed nur la granda industrio disvolvis unuflanke la konfliktojn, kiuj levas transformegon de la produktadmaniero, forigon de ĝia kapitalisma karaktero al absoluta

nepreco - konfliktoj ne nur de la klasoj, kiujn ĝi kreis, sed ankaŭ de la produktadfortoj kaj interŝanĝformoj kreitaj de ĝi mem -; kaj ĝi disvolvas aliflanke en ĝuste tiuj gigantaj produktadfortoj ankaŭ la rimedojn por solvi tiujn konfliktojn. Se do ĉirkaŭ 1800 la konfliktoj fontantaj el la nova sociordo estis ankoraŭ estiĝantaj, des malpli la rimedoj de ilia solvo estis evoluintaj. La neposedantaj klasoj de Parizo, kiuj dum la terorperiodo povis por momento konkeri la regadon kaj per tio venkigi la burĝan revolucion, eĉ kontraŭ la burĝaro, per tio pruvis, kiom malebla ilia regado sub la tiamaj kondiĉoj estis por la daŭro. La proletaro, kiu el tiuj neposedantaj amasoj nur ĵus apartigis kiel kerno de nova klaso, ankoraŭ tute nekapabla je memstara politika agado, prezentiĝis kiel subpremata, suferanta stato, kiu en sia nekapablo helpi sin mem estis helpebla, se entute, per helpo desupra.

Tiu historia situacio regis ankaŭ la iniciatintojn de socialismo. Al la nematura stato de la kapitalisma produktado, al la nematura klasa situacio, respondis nematuraj teorioj. La solvo de la sociaj taskoj, kiuj en la neevoluintaj ekonomiaj kondiĉoj kuŝis ankoraŭ kaŝita, devis esti produktata el la kapo. La socio prezentis nur misojn; forigi tiujn estis tasko de la pensanta racio. Temis pri tio, inventi novan, pli perfektan sistemon de socia ordo kaj trudi tiun al la socio deekstere, per propagando, laŭeble per la ekzemplo de modelaj eksperimentoj. Tiuj novaj sistemoj estis dekomence kondamnitaj al utopio; ju pli ili estis ellaboritaj en siaj detaloj, des pli ili devis konduki en puran fantaziaĵon.

Post tiu konstato ni jam ne haltas eĉ nur momenton ĉe tiu flanko, kiu apartenas nun tute al la pasinteco. Ni povas lasi al literaturaj detalemuloj solene pripalpi tiujn, hodiaŭ jam nur gajigajn fantaziaĵojn kaj valorigi la superecon de sia propra sobra pensmaniero fronte al tia „frenezo”. Ni prefere ĝojas pri la geniaj pensoĝermoj kaj pensoj, kiuj sub la fantazia ŝelo ĉie aperas kaj por kiuj tiuj filistroj estas blindaj.

Sentsimono estis filo de la granda franca revolucio, ĉe kies eksplodo li estis ankoraŭ ne tridekjara. La revolucio estis la venko de la tria stato, t.e. de la granda, en la produktado kaj en komerco *aganta* amaso de la nacio, super la ĝis tiam privilegiaj nelaborantaj<sup>20</sup> statoj, nobelaro kaj klerikaro. Sed la

---

20 En la originalo: „*müßigen Stände*”, - tavoloj neaktivaj, neokupataj, ne laborantaj, pigraj. -vl

venko de la tria stato baldaŭ montriĝis kiel la ekskluziva venko de malgranda parto de tiu stato, kiel konkero de la politika potenco fare de ĝia socie privilegiita tavolo, la posedanta burĝaro. Tiu burĝaro ankoraŭ dum la revolucio rapide evoluis per spekulado pri la konfiskita kaj poste *vendita* grundposedo de la nobelaro kaj de la eklezio, kiel ankaŭ per trompado de la nacio per la armeaj liverantoj. Estis ĝuste la regado de tiuj trompisto, kiu sub la direktorio kondukis Francion kaj la revolucion al la rando de pereoj kaj per tio donis al Napoleono la pretekston por sia ŝtatenverso. Tiel en la kapo de Sentsimono la kontraŭeco de la tria stato kaj privilegiaj statoj alprenis la formon de kontraŭeco de „laboristoj” kaj „nelaborantoj”. La nelaborantoj estis ne nur la malnovaj privilegiuloj, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj sen partopreno en produktado kaj komerco vivis per rentoj. Kaj la „laboristoj” estis ne nur la dunglaboristoj, sed ankaŭ la fabrikistoj, la komercistoj, la bankistoj. Ke la nelaborantoj perdis la kapablon je spirita gvidado kaj politika regado, tio estis klara kaj de la revolucio definitive sigelita. Ke la neposedantoj ne posedis tiun kapablon, tio ŝajnis al Sentsimono pruvita per la spertoj de la terotempo. Sed kiu gvidu kaj regu? Laŭ Sentsimono la scienco kaj la industrio, ambaŭ kunigitaj per nova religia ligo, destinita restarigi la de la reformacio rompitan unuecon de la religiaj perceptoj, nepre mistika kaj severe hierarĥia „nova kristaneco”. Sed la scienco, tio estis la oficialaj kleruloj, kaj la industrio, tio estis unuavice la aktivaj burĝoj, fabrikistoj, komercistoj, bankistoj. Tiuj burĝoj devis ja transformiĝi en iajn publikajn oficistojn, sociajn konfidulojn, sed tamen konservi kontraŭ la laboristoj ordonan kaj ankaŭ ekonomie privilegian pozicion. Ekz-e la bankistoj, per regulado de la kredito, estus alvokitaj reguligi la tutan socian produktadon. Tiu koncepto tute kongruis kun tempo, dum kiu en Francio la granda industrio, kaj kun ĝi la kontraŭeco de burĝaro kaj proletaro, estis ankoraŭ nur estiĝanta. Sed tio, kion Sentsimono speciale emfazas, estas la jeno: Ĉie kaj ĉiam li zorgas unue pri la sorto „de la plej multnombra kaj plej malriĉa klaso” (la classe la plus nombreuse et la plus pauvre).

Sentsimono starigas jam en siaj Ĝenevaj Leteroj la devizon, ke „ĉiuj homoj devas labori”.

En la sama verko li jam scias, ke la terora regado estis la regado de la neposedantaj amasoj:

„Rigardu”, li krias al ili, „kio en Francio okazis dum la tempo, kiam viaj kamarado regis tie, ili kreis la malsatmizeron.”

Sed kompreni la Francan Revolucion kiel klasbatalon, kaj ne nur inter nobelaro kaj burĝaro, sed inter nobelaro, burĝaro kaj *neposedantoj*, tio estis en la jaro 1802 ege genia malkovro. En la jaro 1816 li klarigas la politikon pri la scienco de produktado kaj antaŭdiras la tutan sorbiĝon de la politiko en la ekonomio. Kvankam en tio montriĝas nur ĝerme la ekkono, ke la ekonomia situacio estas la bazo de la politikaj institucioj, tamen ĉi tie estas jam klare eldirita la transigo de la politika regado super homoj en administradon de aĵoj kaj en gvidadon de produktadprocezoj, do la lastatempe tiom brue kaj detale priparolata „forigo de la ŝtato”. Kun sama supereco super siaj samtempuloj li proklamis en 1814, tuj post la enmarŝo de la aliancanoj en Parizon, kaj ankoraŭ en 1815, dum la centtaga milito, ke la alianco de Francio kun Anglio kaj duavice de ambaŭ landoj kun Germanio estas la sola garantio por prospera evoluo kaj por la paco en Eŭropo. Prediki al la francoj de 1815 alianco kun la venkintoj de Vaterlo, tio efektive postulis same multe da kuraĝo kiom da historia kapablo vidi malproksimen.

Dum ni ĉe Sentsimono malkovras genian longecon de rigardo, pro kiu preskaŭ ĉiuj ne strikte ekonomiaj pensoj de la postaj socialistoj estas ĉe li jam ĝerme entenataj, ni trovas ĉe Furiero tipe france spritan, sed pro tio ne malpli profundan kritikon de la ekzistantaj sociaj kondiĉoj. Furiero persistas ĉe la vortoj de la burĝaro, de ties entuziasmaj profetoj antaŭ la revolucio kaj de ties profitcelaj laŭdaĉantoj post la revolucio. Li senkompate malkaŝas la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo; li apudigas al tio la brilajn promesojn de la fruaj klerigistoj pri la socio, en kiu regos nur la racio, pri la ĉion feliĉiga civilizacio, pri la senlima homa perfektigkapablo, kiel ankaŭ la beligajn priskribojn de la samtempaj burĝaj ideologiistoj; li pruvas, ke al la plej solena frazo respondas ĉie la plej mizera realo, kaj akre mokas tiun nesaveblan fiaskon de la frazo. Furiero estas ne nur kritikanto, lia ĉiam gaja naturo faras lin satiristo, kaj pli precize unu el la plej grandaj satiristoj de ĉiuj tempoj. La kun la perejo de la revolucio ekfloranta trompo-spekuladon same kiel la ĝeneralan avidecon de la tiama franca komerco li priskribas same majstre kiel delekte. Eĉ pli majstra estas lia kritiko de la burĝa formado de la rilatoj inter la seksoj kaj la pozicio de la virino en la burĝa socio. Li estas la unua kiu diras, ke en donita socio la grado de virina

emancipiĝo estas la natura mezuro de la ĝenerala emancipiĝo. Sed plej grandioze Furiero montriĝas en sia koncepto de la historio de la socio. Li dividas ĝian tutan ĝisnunan evoluon en kvar evoluŝtupojn: sovaĝeco, patriarĥeco, barbareco, civilizacio, kiu lasta koincidas kun la nun tiel nomata burĝa socio, do kun la socia ordo enkondukita ekde la 16-a jarcento, kaj pravas,

„ke la civilizita ordo levas tiun malvirton, kiun la barbareco praktikas en simpla maniero, al kunmetita, dusenca, ambigua, hipokrita ekzistmaniero”,

ke la civilizacio moviĝas en „erara cirkulado”, en kontraŭdiroj, kiujn ĝi ĉiam denove kreas, sen povi superi ilin, tiel ke ĝi ĉiam atingas la malon de tio, kion ĝi volas atingi aŭ ŝajnigas voli atingi. Tiel, ke ekz-e

„en la civilizacio la malriĉeco fontas el la abundeco mem”.

Furiero, kiel oni vidas, manipulas la dialektikon per la sama majstreco kiel lia samtempulo Hegelo. Kun sama dialektiko li emfazas, kontraŭ la babilado pri la senlima homa perfektigkapablo, ke ĉia historia frazo havas sian supreniran, sed ankaŭ sian malsupreniran tigon, kaj aplikas tiun perceptmanieron ankaŭ al la estonteco de la tuta homaro. Kiel Kantio enkondukis la estontan pereon de la Tero en la natursciencan, Furiero enkondukas la estontan pereon de la homaro en la historian percepton.

Dum en Francio la uragano de la revolucio trabalais la landon, en Anglio okazis pli silenta, sed pro tio ne malpli giganta transformego. La vaporoj kaj la nova ilmaŝinaro transformis la manufakturon en la modernan grandan industrion kaj per tio revoluciis la tutan bazon de la burĝa socio. La dormema evoluo de la manufaktura tempo transformiĝis en veran ŝtorman periodon de la produktado. Kun ĉia kreskanta rapideco okazis la disigo de la socio en grandajn kapitalistojn kaj senposedajn proletojn, inter kiuj, anstataŭ la antaŭa meza stato, nun malkonstanta amaso de metiistoj kaj etkomercistoj vivis en malcerta ekzistado, la plej fluktuantaj partoj de la loĝantaro. Ankoraŭ la nova produktadmaniero estis nur ĉe la komenco de sia suprenira tigo; ankoraŭ ĝi estis la normala, regula, la sub la cirkonstancoj sole ebla produktadmaniero. Sed jam tiam ĝi kreis kiantajn sociajn misojn: kunpremadon de loĝantaro sen hejmlando en plej malbonajn loĝejojn de grandaj urboj - nuligo de ĉiaj tradiciaj ligoj de deveno, de patriarĥa subordiĝo, de la familio - trolaboro speciale de la virinoj kaj infanoj en terura mezuro -

amasa senmoraligo de la laboranta klaso subite ĵetita en tute novajn kondiĉojn, de la kamparo en la urbon, de la kampkulturo en la industrion, el stabilaj vivkondiĉoj en ĉiutage ŝanĝiĝantaj kaj malcertajn. Jen dudeknaŭ-jara fabrikisto aperis kiel reformisto, viro de ĝisnoblece infana simpleco de karaktero kaj samtempe naskita gvidanto de homoj kiel malmultaj. Roberto Oveno estis alpropriginta al si la instruon de la materiismaj klerigistoj, ke la karaktero de la homo estas la produkto unuflanke de la ennaskita organiziteco kaj aliflanke de la cirkonstancoj, kiuj ĉirkaŭas la homon dum lia vivtempo, sed speciale dum la evoluperiodo. En la industria revolucio la plej multaj el liaj samstandanoj vidis nur konfuzon kaj ĥaŝon, bonan por trompi kaj rapide riĉiĝi. Li vidis en ĝi la okazon apliki sian preferatan maksimumon kaj per tio meti ordon en la ĥaŝon. Jam en Manĉestro li estis provinta tion, kiel gvidanto super kvincent laboristoj en fabriko, de 1800 ĝis 1829 li gvidis la grandan kotonŝpivejon de New Lanark en Skotlando kiel direktanta asocio en la sama senco, sed kun pli granda aglibereco kaj kun sukceso, kiu famigis lin tra Eŭropo. Loĝantaron, kiu iom post iom kreskis al 2.500 homoj kaj kiu origine konsistis el la plej miksitaj kaj plejparte forte demoraliziĝintaj elementoj, li transformis en kompletan modelkolonion, en kiu ebrieco, polico, punjuĝistoj, procesoj, malriĉulprizorgado, bezono de bonfaro estis nekonataj aferoj. Kaj simple per tio, ke li metis la homojn en pli homindajn cirkonstancojn kaj speciale la junan generacion igis zorge eduki. Li inventis la lernejojn por infanetoj kaj tie unue enkondukis ilin. Ekde la dua vivojaro la infanoj frekventis la lernejon, kie ili tiom bone distriĝis, ke ili estis apenaŭ reheimigeblaj. Dum liaj konkurencantoj laborigis dum 13 ĝis 14 horoj ĉiutage, en New Lanark oni laboris nur 10 horojn kaj duono. Kiam kotonkrizo devigis al kvarmonata nelaborado, oni pagis al la nelaborantaj laboristoj la plenan salajron. Kaj ĉe tio la stablo pli ol duobligis sian valoron kaj ĝis la fino donis abundan profiton al la proprietuloj.

Pri ĉio ĉi Oveno ne kontentiĝis. La ekzistado, kiun li estis kreinta al siaj laboristoj, estis en liaj okuloj ankoraŭ delonge ne hominda;

„la homoj estis miaj sklavoj”;

la relative favoraj cirkonstancoj, en kiujn li estis ilin metintaj, estis ankoraŭ tre malproksimaj de tio, ke ili ebligis ĉiuf flankan racian evoluon de la karaktero kaj de la menso, kaj eĉ malpli ian liberan vivagadon.

„Kaj tamen la laboranta parto de tiuj 2.500 homoj produktis same multe realan riĉaĵon por la socio, kiom apenaŭ duonjarcenton antaŭe loĝantaro de 600.000 povis produkti. Mi demandis min: Kio fariĝos la diferenco inter la riĉaĵo konsumata de 2.500 homoj kaj tiu, kiun 600.000 devas konsumi?“

La respondo estis klara: Ĝi estis uzata por doni al la posedantoj de la establo 5 % da interezoj el la investkapitalo kaj krome ankoraŭ pli ol 300.000 sterlingajn pundojn (6.000.000 markojn) da profito. Kaj kio ĝustis pri New Lanark, tio ĝustis en ankoraŭ pli alta mezuro pri ĉiuj fabrikoj de Anglio.

„Sen tiu nova riĉaĵo kreita per la maŝinoj oni ne povintus fari la militojn por faliĝi Napoleonon kaj por konservi la aristokratajn sociajn principojn. Kaj tamen tiu nova potenco estis la kreado de la laboranta klaso.“<sup>21</sup>

Pro tio, al ĝi apartenis ankaŭ la fruktoj. La novaj potencaj produktadfortoj, ĝis nun servantaj nur al pliriĉigo de unuopuloj kaj al servutigo de la amasoj, donis al Oveno la bazon por socia novformado kaj estis destinita por labori kiel komuna proprieto de ĉiuj nur por la komuna prospero de ĉiuj.

En tiu pure sobra<sup>22</sup> maniero, kiel frukto kvazaŭ de komerca kalkulo, estiĝis la ovena komunismo. Ĝi ĉiam konservis tiun karakteron direktitan al la praktiko. Ekz-e en 1823 Oveno proponis la forigon de la irlanda mizero per komunismaj kolonioj kaj apudmetis kompletajn kalkulojn, pri investaj kostoj, jaraj elspezoj kaj atendeblaj enspezoj. Tiel, en lia definitiva estonteco-plano la teĥnika ellaboro de ĉiaj detaloj, inkluzive de horizontala kaj vertikala projekciaĵo, de skizo el birdoperspektivo, estis plenumita kun tia fakscio, ke, se oni konsentas pri la ovena metodo de socireformo, kontraŭ la detala instalaĵo nur malmulte direblas eĉ el fakula vidpunkto.

La progreso al komunismo estis la turnopunkto en la vivo de Oveno. Tiom longe, kiom li prezentigis kiel nura filantropo, li rikoltis nenion ol riĉaĵon, aplaŭdon, honoron kaj famon. Li estis la plej populara viro en Eŭropo. Ne nur liaj samstanduloj, ankaŭ ŝtatestoj kaj princoj aplaŭde aŭs-

21 El: „The Revolution in Mind and Practice“, memuaro direktita al ĉiuj „ruĝaj respublikanoj, komunistoj kaj socialistoj de Eŭropo“ kaj sendita al la franca provizora registaro de 1848, sed ankaŭ al „la reĝino Viktorio kaj al ŝiaj respondecaj konsilistoj“.

22 En la originalo: „geschäftsmäßige Weise“, - oficeca, sobra, kalkula, senpersona, ... maniero. -vl

kultis lin. Sed ekde kiam li elpaŝis kun siaj komunismaj ideoj, la situacio ŝanĝiĝis. Estis tri grandaj malhelpoj, kiuj precipe ŝajnis bari al li la vojon al la socia reformo: la privata proprieto, la religio kaj la nuna formo de geedzeco. Li sciis, kio atendis lin, kiam li atakis ilin: la ĝenerala proskribo fare de la oficiala socio, la perdo de lia tuta socia pozicio. Sed li ne detenis sin ataki ilin senrezerve, kaj okazis, kion li estis antaŭvidinta. Proskribita el la oficiala socio, absolute prisilentata fare de la gazetaro, malriĉiĝinta pro malsukcesaj komunismaj provoj en Ameriko, en kiuj li oferis sian tutan havaĵon, li turnis sin rekte al la laborista klaso kaj en ĝia mezo li restis ankoraŭ aktiva dum tridek jaroj. Ĉiuj sociaj movadoj, ĉiuj realaj progresoj, kiuj okazis en Anglio en la intereso de la laboristoj, estas ligitaj kun la nomo Oveno. Li ekz-e trudis en 1819, post kvinjara klopodado, la unuan leĝon por limigi la virin- kaj infan-laboron en la fabrikoj. Li ekz-e prezidis al la unua kongreso, dum kiu la sindikatoj (Trade Unions) de tuta Anglio unuiĝis en unu solan grandan sindikaton. Ekz-e li enkondukis kiel transiran disponon al kompleta komunisma formado de la socio unuflanke la kooperativajn societojn (konsum- kaj produktad-kooperativojn), kiuj de tiam almenaŭ donis la praktikan pruvon, ke la komercisto kiel la fabrikisto estas ambaŭ tre superflujaj personoj; aliflanke la laborbazarojn, instituciojn por interŝanĝi laborproduktojn pere de labora papermono, kies unuo estis la laborhoru; institucioj, kiuj devis nepre fiaski, sed kiuj komplete anticipis la multe pli postan prudentan interŝanĝbankon, tamen distingiĝis de tiu ĝuste per tio, ke ili ne prezentiĝis kiel universala rimedo kontraŭ ĉiuj sociaj malbonaĵoj, sed nur kiel unua paŝo al multe pli radikala transformego de la socio.

La vidmaniero de la utopiistoj longe dominis la socialismajn ideojn de la 19-a jarcento kaj parte ankoraŭ nun dominas ilin. Ankoraŭ ĝis antaŭ nelonge ĉiuj francaj kaj anglaj socialistoj omaĝis ĝin, al ĝi apartenas ankaŭ la pli frua germana komunismo inkluzive de Vajtlingo<sup>23</sup>. La socialismo estas por ili ĉiuj la esprimo de la absoluta vero, racio kaj justeco kaj bezonas nur esti malkovrita por propraforte konkeri la mondon; ĉar la absoluta vero estas sendependa de tempo, spaco kaj homa historia evoluo, tial estas nura hazardo, kiam kaj kie ĝi estos malkovrita. Ĉe tio la absoluta vero, racio kaj justeco estas siavice ĉe ĉiu skol-kreanto diversa; kaj ĉar ĉe ĉiu la aparta maniero de la absoluta vero, racio kaj justeco estas siavice kondiĉita de lia

---

23 Originale: Weitling. -vI



subjektiva kompreno, de liaj vivkondiĉoj, de lia mezuro de konoj kaj pensa instruiteco, tial en tiu konflikto de absolutaj veroj ne eblas alia solvo ol tiu, ke ili sin reciproke erodas. Ĉe tio ne povis rezulti io alia ol speco de eklekta mezum-socialismo, kiu efektive regas ĝis hodiaŭ en la mensoj de la plej multaj laboristoj en Francio kaj Anglio, miksaĵo, kiu allasas ekstreme diversajn nuancojn el la malpli skandaligaj kritikaj eldiroj, ekonomiaj teoremoj kaj ideoj de la fondintoj de diversaj sektoj pri la socia estonteco, miksaĵo, kiu fariĝas des pli facile, ju pli al ĉiu konsista parto en la fluo de la debato forŝlifiĝis la akraj eĝoj de precizeco kvazaŭ al rondaj ŝtonoj en rivereto. Por fari el la socialismo sciencon, ĝi devis unue esti metita sur realan grundon.

## 2

Intertempe aperis apud kaj post la franca filozofio de la 18-a jarcento la nova germana filozofio kaj trovis en Hegelo sian finon. Ĝia plej granda merito estis la re-alprenado de la dialektiko kiel la plej alta formo de pensado. La malnovgrekaj filozofoj estis ĉiuj denaskaj dialektikistoj, kaj la plej universala menso inter ili, Aristotelo, ankaŭ jam esploris la esencajn formojn de dialektika pensado. La nova filozofio, male - kvankam ankaŭ en ĝi la dialektiko havis brilajn reprezentantojn (ekz-e Kartezion kaj Spinozon) -, speciale pro angla influo pli kaj pli ensablighis en la tiel nomata metafizika pensmaniero, kiu preskaŭ ekskluzive regis ankaŭ la francojn de la 18-a jarcento, almenaŭ en iliaj specife filozofiaj laboraĵoj. Ekstere de la proprasenca filozofio ili ankaŭ kapablis liveri majstroverkojn de dialektiko; ni memoru nur „La nevo de Ramo” de Dideroto kaj la „Traktaĵon pri la origino de la malegaleco inter la homoj” de Rusoo. Ni indiku ĉi tie mallonge la esencon de ambaŭ pensmetodoj.

Kiam ni submetas la naturon aŭ la homan historion aŭ nian spiritan aktivecon al la pensanta konsidero, tiam prezentiĝas al ni unue la bildo de senfina interplektiĝo de interrilatoj kaj de interefikoj, en kiu nenio restas, kio, kie kaj kia ĝi estis, sed ĉio moviĝas, ŝanĝiĝas, fariĝas kaj pereas. Ni vidas do unue la tutan bildon, en kiu la detaloj estas ankoraŭ pli aŭ malpli fonaj, ni atentis pli la moviĝon, la transiron, la interrilatojn, ol tion kio moviĝas, transiras kaj interrilatas. Tiu origina, naiva, sed fakte ĝusta mond-percepto estas tiu de la malnova greka filozofio kaj estas unue klare eldirita de Heraklito: Ĉio estas kaj ankaŭ ne estas, ĉar ĉio *fluas*, estas en konstanta ŝanĝiĝo, konstante fariĝanta kaj pereanta. Sed tiu percepto, kvankam ĝi ĝuste komprenas la ĝeneralan karakteron de la tuta bildo de la fenomenoj, tamen ankoraŭ ne sufiĉas por klarigi la detalojn, el kiuj tiu tuta bildo kunmetiĝas; kaj tiom longe, kiom ni tiujn ne konas, ni ankaŭ ne havas klarecon pri la tuta bildo. Por ekkoni tiujn detalojn, ni devas unue elpreni ilin el ilia natura aŭ historia interrilato kaj esplori ilin, ĉiun unuope, laŭ ilia eco, iliaj apartaj kaŭzoj kaj efikoj ktp. Tio estas unue la tasko de la naturscienco kaj esplorado de la historio; ili estas esplorbranĉoj, kiuj pro tre bonaj kialoj ĉe la grekoj de la klasika tempo okupis nur suban rangon, ĉar tiuj devis antaŭ ĉio unue alporti la materialon. Nur post kiam la natura kaj historia materialo estas ĝis certa grado kolektita, oni povas aliri la kritikan trarigardon, la komparon respektive la dividon en klasojn, ordojn kaj speciojn. La komencoj de la preciza natursplorado estis do plu disvolvigitaj nur ĉe la grekoj de la aleksandra periodo kaj poste, en la mezepoko, de la araboj; vera naturscienco tamen datiĝas nur ekde la dua duono de la 15-a jarcento, kaj ekde tiam ĝi

faris progresojn kun kreskanta rapido. La divido de la naturo en ĝiajn unuopajn partojn, la apartigo de la diversaj naturfenomenoj kaj naturobjektoj en klasojn, la esplorado de la interno de la organikaj korpoj laŭ iliaj diversspecaj anatomiaj formoj estis la baza kondiĉo de la gigantaj progresoj, kiujn la lastaj kvarcent jaroj donis al ni sur la kampo de ekkono de la naturo. Sed ĝi postlasis al ni ankaŭ la kutimon kompreni la naturajn aĵojn kaj la naturajn okazaĵojn en ilia unuopeco, ekster la granda kunteniĝo; pro tio ne en ilia moviĝo, sed en ilia stagno; ne kiel esence ŝanĝiĝemaj, sed kiel fiksaj konstataĵoj<sup>24</sup>; ne en ilia vivo, sed en ilia malvivo. Kaj per tio, ke tiu perceptmaniero transiĝis el la naturscienco en la filozofion - kiel ĉe *Bacon* kaj *Locke* -, ĝi kreis la specifan penslimigitecon de la lastaj jarcentoj, la metafizikan pensmanieron.

Por la metafizikisto la aĵoj kaj iliaj pensaj reflektoj, la nocioj, estas unuopaj esplorobjektoj rigardendaj unu post la alia kaj sen rigardi la alian, fiksaj, rigidaj, donitaj unufoje por ĉiam. Li pensas en nuraj neperataj kontraŭdiroj: lia parolo estas jes, jes, ne, ne, ĉio kroma estas malbona. Por li, aĵo aŭ ekzistas aŭ ĝi ne ekzistas: aĵo ankaŭ ne povas esti samtempe ĝi mem kaj io alia. Pozitiva kaj negativa absolute ekskludas sin reciproke; kaŭzo kaj efiko staras same en reciproka rigida kontraŭeco. Tiu pensmaniero ŝajnas al ni unuavide plej logika ĉar ĝi estas tiu de la tiel nomata homa saĝo. Sed la homa saĝo, eĉ se ĝi estas respektinda ulo en la naiva tereno de siaj kvar vandoj, spertas tute mirigajn aventurojn, ekde kiam ĝi kuraĝas eliri en la vastan mondon de la esplorado; kaj la metafizika rigardmaniero, eĉ se ĝi estas prava kaj eĉ necesa sur vastaj, laŭ la naturo de la objekto etenditaj kampoj, tamen ĉiufoje pli aŭ malpli frue renkontas baron, trans kiu ĝi fariĝas unuflanka, limigita, abstrakta kaj perdiĝas en nesolveblaj kontraŭdiroj, ĉar ĝi tra la unuopaĵoj forgesas ties kunteniĝon, tra ilia esto ilian estiĝon kaj malestiĝon, tra ilia trankvilo ilian moviĝon, ĉar pro la multaj arboj ĝi ne vidas la arbaron. Por ĉiutagaj okazoj ni ekz-e scias kaj povas kun certeco diri, ĉu animalo ekzistas aŭ ne; sed ĉe pli preciza esploro ni trovas, ke tio estas kelkfoje plej komplika afero; la juristoj tre bone scias tion, kiuj vane klopodegis por malkovri racian limon, ekde kiu la mortigo de infano en la patrina ventro estas murdo; kaj same maleblas konstati la momenton de la morto, ĉar la fiziologio pravas, ke la morto ne estas unufoja, momenta

---

24 En la originalo: „feste Bestände”. -vl

okazaĵo, sed tre longdaŭra fenomeno. Same, ĉiu organika estaĵo estas en ĉiu momento la sama kaj ne la sama; en ĉiu momento ĝi prilaboras materialon alkondukitan deekstere kaj eligas aliajn, en ĉiu momento ĉeloj de ĝia korpo mortas kaj novaj estiĝas; post pli aŭ malpli longa tempo la materialo de tiu korpo estas komplete renovigita, anstataŭigita per aliaj atomoj de la materialo, tiel ke ĉiu organizita<sup>25</sup> estaĵo estas ĉiam la sama kaj tamen io alia. Krome ni trovas ĉe pli detala rigardo, ke la du polusoj de kontraŭaĵo, ekz-e pozitiva kaj negativa, estas same nedisigeblaj kiel kontraŭaj kaj ke ili malgraŭ ĉia kontraŭeco ili reciproke trapenetras sin; same, ke kaŭzo kaj efiko estas imagoj, kiuj estas validaj nur en la apliko al la unuopa kazo, sed ke ili, ekde kiam ni rigardas la unuopan kazon en ĝia ĝenerala kunteniĝo kun la monda tutaĵo, kuniĝas, dissolviĝas en la percepto de la universala reciproka efikado, kie kaŭzoj kaj efikoj konstante ŝanĝas sian lokon, tio, kio nun aŭ ĉi tie estas efiko, fariĝas tie aŭ tiam kaŭzo kaj inverse.

Ĉiuj ĉi okazaĵoj kaj pensmetodoj ne eniras en la kadron de la metafizika pensado. Por la dialektiko, male, kiu komprenas la aĵojn kaj iliajn nociajn bildojn esence en ilia kunteniĝo, ilia interplektiĝo, ilia moviĝo, ilia estiĝo kaj malestiĝo, fenomenoj kiel la supraj estas konfirmoj de ĝia propra procedmaniero. La naturo estas la pruvilo por la dialektiko, kaj ni devas danki al la moderna naturscienco, ke ĝi por tiu pruvilo liveris ekstreme abundan, ĉiutage pli ampleksan materialon kaj per tio pruvis, ke la okazaĵoj en la naturo estas lastinstance dialektikaj kaj ne metafizikaj, ke ĝi moviĝas ne en la eterna sameco de ĉiam ripetiĝanta rondo, sed ke ĝi trairas realan historion. Ĉi tie nomendas antaŭ ĉio Darvino, kiu donis la plej fortan baton al la metafizika naturkoncepto per sia pruvo, ke la tuta hodiaŭa organika naturo, plantoj kaj animaloj kaj per tio ankaŭ la homo, estas la produkto de evoluprocezo, kiu daŭris milionojn da jaroj. Sed ĉar ĝis nun tiuj naturesploristoj, kiuj lernis pensi dialektike, estas tiom malmultaj, ke oni povas nombri ilin, tial la senlima konfuziĝo kompreneblas, kiu estiĝis el la konflikto de la malkovritaj rezultoj kun la tradicia pensmaniero kaj kiu regas nun en la teoria naturscienco kaj kiu malesperigas instruistojn kiel lernantojn, verkistojn kiel legantojn.

Preciza prezentado de la monda tutaĵo, de ĝia evoluo kaj tiu de la homaro same kiel tiu de la spegubildo de tiu evoluo en la mensoj de la

---

25 En la franca eldono: organika. -mew

homoj, povas do estiĝi nur sur dialektika vojo, kun konstanta konsidero de la ĝeneralaj reciprokapaj efikoj de estiĝo kaj malestiĝo, de la progresaj aŭ malprogresaj ŝanĝiĝoj. Kaj tiusence la nova germana filozofio tuj elpaŝis. Kantio komencis sian karieron per tio ke li dissolvis la stabilan sunsistemon de Newton kaj ĝian - post kiam la fama unua impulso estis donita - eternan daŭron en historian okazaĵon: en la estiĝon de la suno kaj de ĉiuj planedoj el rotacianta nebul-amaso. El tio li jam konkludis, ke kun tiu estiĝo estas nepre donita ankaŭ la estonta perejo de la sunsistemo. Lia opinio estis duonjarcenton poste matematike fundita de Laplace, kaj kroman duonan jarcenton poste la spektroskopio pruvis la ekziston de tiaj ardantaj gas-amasoj, en diversaj ŝtupoj de densiĝo, en la kosmo.

Tiu nova germana filozofio trovis sian finon en la sistemo de Hegelo, en kiu unuafoje - kaj tio estas lia granda merito - la tuta natura, historia kaj spirita mondo estas prezentata kiel procezo, t.e. kiel konstante moviĝanta, transformiĝanta kaj evoluanta, kaj en kiu estas provita pruvi la internan kunteniĝon en tiu moviĝo kaj evoluo. El tiu vidpunkto la historio de la homaro jam ne aperas kiel sovaĝa ĥaoso de sensecaj perfortaĵoj, kiuj antaŭ la juĝo de la nun maturiĝinta filozofia racio estas ĉiuj same kondamnindaj kaj kiujn oni prefere plej rapide forgesu, sed kiel la evoluprocezo de la homaro mem, kies iom-post-ioman laŭŝtupan iradon tra ĉiaj erarvojetoj sekvi kaj ties internan leĝecon tra ĉiaj ŝajnaj hazardaĵoj pruvi fariĝis nun la tasko de la pensado.

Ke la hegela sistemo ne solvis la taskon, kiun ĝi metis al si, ne gravas ĉi tie. Ĝia epokfara merito estis, ke ĝi metis ĝin. Temas ja pri tasko, kiun neniu unuopulo iam ajn povos solvi. Kvankam Hegelo - apud Sentsimono - estis la plej universala menso de sia tempo, li estis tamen limigita unue per la nepre limigita amplekso de siaj propraj konoj kaj due per la ankaŭ laŭ amplekso kaj profundo limigitaj konoj kaj perceptoj de sia epoko. Sed al tio aldoniĝis ankoraŭ io tria. Hegelo estis idealisto, t.e., li konsideris la pensojn de sia kapo ne kiel la pli aŭ malpli abstraktajn bildojn de la realaj aĵoj kaj okazaĵoj, sed inverse la aĵojn kaj ilian evoluon li konsideris nur la realigitaj bildoj de la iel jam antaŭ la mondo ekzistanta „ideo”. Per tio, ĉio estis metita sur la kapon kaj la reala kunteniĝo de la mondo komplete inversigita. Kaj kvankam multaj unuopaj kunteniĝoj estis de Hegelo ĝuste kaj genie komprenataj, tamen pro la indikitaj kaŭzoj multo devis rezulti ankaŭ en la

detalo flikita, artefarita, konstruita, mallonge: inversigita<sup>26</sup>. La hegela sistemo kiel tia estis kolosa misnasko - sed ankaŭ la lasta de sia speco. Ĉar ĝi suferis ankoraŭ alian nekuraĉeblan kontraŭdiron: unuflanke ĝi havis kiel esencan premison la historian percepton, laŭ kiu la homa historio estas evoluprocezo, kiu laŭ sia naturo ne povas per malkovro de tiel nomata absoluta vero trovi sian intelektan finon; sed aliflanke ĝi asertas esti la kvintesenco de tiu absoluta vero. Ĉion ampleksanta, unufoje por ĉiam finanta definitiva sistemo de la ekkono de la naturo kaj de la historio staras en kontraŭdiro kun la bazaj leĝoj de dialektika pensado; tio tute ne ekskludas, sed male inkludas, ke la sistema ekkono de la tuta ekstera mondo povas de generacio al generacio fari gigantajn progresojn.

La kompreno de la kompleta inversigiteco<sup>27</sup> de la ĝistiamaj germana idealismo kondukis nepre al la materiismo, sed kompreneble ne al la nur metafizika, ekskluzive meĥanika materiismo de la 18-a jarcento. Kontraste al la naive revolucia, simpla rifuzo de ĉia antaŭa historio, la moderna materiismo vidas en la historio la estiĝprocezon de la homaro, kies moviĝoleĝojn malkovri estas ĝia tasko. Kontraste al la percepto de la naturo, kiu regis ĉe la francoj de la 18-a jarcento kaj ankoraŭ ĉe Hegelo, kiel senŝanĝa tutaĵo moviĝanta en densaj cirkuladoj, kun eternaj kosmaj korpoj, kiel Newton instruis, kaj senŝanĝaj specioj de organikaj estaĵoj, kiel Linné instruis, ĝi resumas la novajn progresojn de la naturscienco, laŭ kiu ankaŭ la naturo havas sian historion en la tempo, la kosmaj korpoj same kiel la specioj de la organismoj, de kiuj ili estas sub favoraj cirkonstancoj priloĝataj, estiĝas kaj pereas, kaj la cirkuladoj, en la mezuro, en kiu ili entute eblas, alprenas senfine pli grandajn dimensiojn. En ambaŭ kazoj ĝi estas esence dialektika kaj jam ne bezonas filozofion kiu staras super la aliaj sciencoj. Ekde kiam ĉiu unuopa scienco respondas al la postulo trovi klarecon pri sia pozicio en la ĉioma kunteniĝo de la aĵoj kaj de la kono pri la aĵoj, tiam ĉia aparta scienco pri la ĉioma kunteniĝo estas superflua. Tio, kio tiam ankoraŭ restos el la tuta ĝisnuna filozofio kiel io memstara, estas la instruo pri la pensado kaj pri ties leĝoj - la formala logiko kaj la dialektiko. Ĉio cetera sorbiĝas en la pozitiva scienco pri naturo kaj historio.

Sed dum la kursŝanĝo en la naturpercepto povis okazi nur en la mezuro,

---

26 En la originalo: „verkehrrt”, - malĝuste, inversigita. -vl

27 En la originalo: „Verkehrtheit”, - malĝusteco, inversigiteco. -vl

en kiu la esplorado liveris la tiurilatan pozitivan ekkonmaterialon, jam multe pli frue montriĝis historiaj faktoj, kiuj alkondukis decidan ŝanĝon en la historia percepto. En la jaro 1831 okazis en Liono la unua laborista ribelo; 1838 ĝis 1842 la unua nacia laborista movado, tiu de la anglaj ĉartistoj, atingis sian apogeon. La klasbatalo inter proletaro kaj burĝaro ekdominis la historion de la plej progresintaj landoj de Eŭropo, sampaŝe kiel tie evoluis unuflanke la granda industrio, aliflanke la nove konkerita politika regado de la burĝaro. La instruoj de la burĝaj ekonomikistoj pri la identeco de la interesoj de kapitalo kaj laboro, pri la ĝenerala harmonio kaj pri ĝenerala popola prospero kiel sekvo de la libera konkurenco montriĝis per la faktoj ĉiam pli frape kiel malveraj. Ĉiuj ĉi faktoj jam ne estis refuteblaj, same kiel la franca kaj angla socialismo, kiu estis ilia teoria, kvankam plej malperfekta esprimo. Sed la malnova idealisma historia percepto, kiu ankoraŭ ne estis anstataŭigita, ne konis amasbatalojn baziĝantajn sur materiaj interesoj, ĝi entute ne konis materiajn interesojn; la produktado kiel ĉiaj ekonomiaj kondiĉoj aperis ĉe ĝi nur preterpase, kiel elementoj subordigitaj al la „kulturhistorio”.

La novaj faktoj devigis submeti la tutan ĝisnunan historion al nova esplorado, kaj tie montriĝis, ke *ĉia* ĝisnuna historio, kun la escepto de la praaj kondiĉoj, estis la historio de klasbataloj, ke tiuj reciproke sin kontraŭbatalantaj klasoj de la socio estas ĉiufoje la produktoj de la produktad- kaj cirkulad-kondiĉoj, per unu vorto, de la *ekonomiaj* kondiĉoj de sia epoko; ke do la respektiva ekonomia strukturo de la socio konsistigas la realan bazon, el kiu la tuta superstrukturo de la juraj kaj politikaj institucioj kaj de la religia, filozofia kaj alia prezentmaniero de ĉiu historia tempa sekcio last-instance klarigeblas. Hegelo liberigis la komprenon de la historio el la metafiziko, li faris ĝin dialektika - sed lia kompreno de la historio estis esence idealisma. Nun la idealismo estis forpelita el sia lasta rifuĝejo, el la percepto de historio, kaj materiisma kompreno de la historio estis donita kaj la vojo trovita por klarigi la konscion de la homoj el ilia esto, anstataŭ kiel ĝis tiam klarigi ilian eston el ilia konscio.

Laŭ tio, la socialismo nun jam aperis ne kiel hazarda malkovro de tiu aŭ alia genia kapo, sed kiel la nepra produkto de la batalo de du historie estiĝintaj klasoj, de la proletaro kaj de la burĝaro. Ĝia tasko jam ne estis produkti kiom eble plej perfektan sistemon de la socio, sed esplori la historian eko-

nomian evoluon, el kiu tiuj klasoj kaj ilia kontraŭeco kun nepreco fontis, kaj malkovri en la per tio kreita ekonomia situacio la rimedojn por solvi la konflikton. Sed kun tiu materiisma koncepto la ĝisnuna socialismo estis same malkongrua kiel la naturkoncepto de la franca materiismo kun la dialektiko kaj kun la nova naturscienco. La ĝisnuna socialismo ja kritikis la ekzistantan kapitalisman produktadmanieron kaj ĝiajn sekvojn, sed ĝi ne povis klarigi ilin, do ankaŭ ne superi ilin; ĝi povis nur simple kondamni ilin kiel malbonajn. Ju pli intense ĝi fulmis kontraŭ la de ĝi nedisigebla ekspluatado de la laborista klaso, des malpli ĝi kapablis klare indiki, en kio tiu ekspluatado konsistas kaj kiel ĝi estiĝas. Sed temis pri tio, prezenti la kapitalisman produktadmanieron en ĝia historia kunteksto kaj en ĝia neceso por certa historia epoko, do ankaŭ la neceson de ĝia pereco, sed aliflanke malkaŝi ankaŭ ĝian internan karakteron, kiu estis daŭre kaŝita. Tio okazis per la senvaligo de la *plusvaloro*. Pruviĝis, ke la alproprigo de nepagata laboro estas la baza formo de la kapitalisma produktadmaniero kaj de la per ĝi realigata ekspluatado de la laboristo; ke la kapitalisto, eĉ se li aĉetas la laborforton de sia laboristo je ĝia plena valoro, kiun ĝi havas kiel varo sur la varmerkato, tamen elprenas pli da valoro el ĝi ol li pagis por ĝi; kaj ke tiu plusvaloro konsistigas lastinstance la valorsumon, el kiu la konstante kreskanta kapitalkvanto amasiĝas en la manoj de la posedantaj klasoj. La procedo de la kapitalisma produktado kiel de la produktado de kapitalo estis klarigita.

Tiujn du grandajn malkovrojn: la materiisman histori-koncepton kaj la malkovron de la sekreto de la kapitalisma produktado pere de la plusvaloro ni dankas al *Markso*. Per ili la socialismo fariĝis scienco, kiu nun devas unue esti ellaborata en ĉiuj siaj detaloj kaj interrilatoj.



### 3

La materiisma percepto de la historio eliras de la teoremo, ke la produktado, kaj post la produktado la interŝanĝo de ĝiaj produktoj, estas la bazo de ĉia socia ordo; ke en ĉiu historie aperanta socio la distribuado de la produktoj, kaj kun ĝi la socia divido en klasoj aŭ standoj, orientiĝas laŭ tio, kio kaj kie estas produktata kaj kiel la produktato estas interŝanĝata. Laŭ tio, la lastaj kaŭzoj de ĉiaj sociaj ŝanĝoj kaj politikaj transformejoj ne estas troveblaj en la kapoj de la homoj, en ilia kreskanta kompreno de la eterna vero kaj justeco, sed en ŝanĝoj de la produktad- kaj interŝanĝ-maniero; ili estas serĉendaj ne en la *filozofio*, sed en la *ekonomio* de la koncerna epoko. La estiĝanta kompreno, ke la ekzistantaj sociaj institucioj estas malraciaj kaj maljustaj, ke racio fariĝis sensencaĵo, bonfaro plago, estas nur signo de tio, ke en la produktadmetodoj kaj interŝanĝformoj tute silente okazis ŝanĝoj, kun kiu la socia ordo, adaptita al antaŭaj ekonomiaj kondiĉoj, jam ne kongruas. Per tio estas dirita, ke la rimedoj por forigi la malkovritajn misojn devas ankaŭ ekzisti en la ŝanĝitaj produktadkondiĉoj mem - pli aŭ malpli evoluintaj. Tiuj rimedoj tute ne estas per la kapo *inventendaj*, sed pere de la kapo *malkovrendaj* en la ekzistantaj materiaj faktoj de la produktado.

Kia estas do nun, laŭ tio, la moderna socialismo?

La ekzistanta sociordo - tio estas nun sufiĉe ĝenerale koncedata - estas kreita de la nun reganta klaso, la burĝaro. La produktadmaniero propra al la burĝaro, ekde Markso nomata kapitalisma produktadmaniero, estis neakordigebla kun la lokaj kaj standaj privilegioj kaj kun la reciprokaj personaj ligoj de la feŭda ordo; la burĝaro disbatis la feŭdan ordon kaj konstruis sur ties ruinoj la burĝan socian konstitucion, la regnon de la libera konkurenco, de libera ekloĝado, de rajtegaleco de la varposedantoj kaj de ceteraj burĝaj belaĵoj. La kapitalisma produktadmaniero povis nun libre disvolviĝi. La produktadkondiĉoj<sup>28</sup> ellaboritaj de la burĝaro disvolviĝis, ekde kiam la vaporo kaj la nova ilmaŝinaro transformis la malnovan manufakturon en grandan industrion, kun ĝis nun senegala rapido kaj en ĝis nun senegala mezuro. Sed kiel siatempe la manufakturo kaj la sub ĝia efiko pludisolvata metio konfliktiĝis kun la ligiloj de la gildoj, tiel la granda industrio en sia plena elformiĝo konfliktiĝas kun la baroj, en kiuj la kapitalisma produktadmaniero tenas ilin limigitaj. La novaj produktadfortoj jam kreskis super la kapon de la burĝa formo, en kiu ili estas uzataj; kaj tiu konflikto inter produktadfortoj kaj produktadmaniero ne estas konflikto estiĝinta en la kapoj de la homoj, kiel ekzemple tiu de la homa prapeko kun la dia justeco,

---

28 En la „Kontraŭ-Duringo”: produktadfortoj. -mev

sed ĝi konsistas el la faktoj, objekte, ekster ni, sendepende de la volo aŭ kurado de eĉ tiuj homoj, kiuj alkondukis ĝin. La moderna socialismo estas nenio pli ol la pensa reflektado de tiu fakta konflikto, ĝia ideo respesuliĝo en la kapoj unue de la klaso, kiu rekte suferas sub ĝi, la klaso laborista.

En kio do konsistas tiu konflikto?

Antaŭ la kapitalisma produktado, do en la mezepoko, ekzistis ĝenerala etentrepreno surbaze de privata proprieto de la laboristoj je siaj produktadrimedoj: la kampkulturo de la malgrandaj, liberaj aŭ servutaj kampuloj, la metio de la urboj. La laborrimedoj - grundo, kampkultura ilaro, metiejo, metia ilaro - estis laborrimedoj de la unuopulo, konceptitaj nur por la unuopa uzado, do nepre etaj, nanaj, limigitaj. Sed ili ĝuste pro tio apartenis ĝenerale al la produktanto mem. Koncentri tiujn disajn, malvastajn produktadrimedojn, etendi ilin, transformi ilin en la potence efikantajn produktadlevilojn de la nuntempo, estis ĝuste la historia rolo de la kapitalisma produktadmaniero kaj de ĝia portanto, la burĝaro. Kiel ĝi historie plenumis tion ekde la 15-a jarcento sur la tri ŝtupoj - la simpla kunlaborado, la manufakturo kaj la granda industrio -, tion Markso detale priskribis en la kvara sekcio de la „Kapitalo”.<sup>29</sup> Sed la burĝaro, kiel estas tie ankaŭ pruvite, ne povis transformi tiujn limigitajn produktadrimedojn en potencajn produktadfortojn, sen transformi ilin el produktadrimedoj de la unuopulo en *sociajn*, aplikeblajn nur de *tutaĵo de homoj*. En la lokon de la ŝpinrado, de la manteksilo, de la forĝista martelo paŝis la ŝpinmaŝino, la meĥanika teksilo, la vapormartelo; en la lokon de la unuopa metiejo la fabriko, kiu neprigas la kunlaboradon de centoj kaj miloj da homoj. Kaj kiel la produktadrimedoj, tiel la produktado mem transformiĝis el serio da unuopaj agoj en vicon da sociaj agoj kaj la produktoj el produktoj de unuopuloj en sociajn produktojn. La fadeno, la tolaĵo, la metalvaroj, kiuj nun venis el la fabriko, estis la komuna produkto de multaj laboristoj, tra kies manoj ili devis laŭvice iri, antaŭ ol esti pretaj. Neniu unuopulo povis diri pri ili: Tion faris mi, tio estas produkto *mia*.

Sed kie la sponta, senplane iom post iom estiĝinta labordivido ene de la socio estas la baza formo de produktado, tie ĝi alpremas al la produktoj la

---

29 Vd Karlo Markso: La kapitalo. Kritiko de la politika ekonomio. Unua volumo. [Librolisto: n-ro 68], p. 294 – 471. -v1

formon de *varoj*, kies reciproka interŝanĝo, aĉeto kaj vendo, kapabligas la unuopajn produktantojn kontentigi siajn diversajn bezonojn. Kaj tio estis en la mezepoko la kazo. La kampulo ekz-e vendis kampkulturajn produktojn al la metiisto kaj per tio aĉetis de tiu metiajn produktojn. En tiun socion de unuopaj produktistoj, varproduktistoj, enŝoviĝis la nova produktadmaniero. Meze en la spontan, *senplanan* labordividon, kiu regis tia en la tuta socio, ĝi metis la *laŭplanan* labordividon, tian kia ĝi estis organizita en la unuopa fabriko; apud la *unuopa* produktado paŝis la *socia* produktado. La produktoj de ambaŭ estis vendataj sur la sama merkato, do je almenaŭ proksimume samaj prezoj. Sed la laŭplana organiziteco estis pli potenca ol la sponta labordivido; la socie laborantaj fabrikoj estigis siajn produktojn malplikoste ol la unuopaj etproduktistoj. La unuopa produktado subiĝis sur unu kampo post la alia, la socia produktado revoluciis la tutan malnovan produktadmanieron. Sed tiu ĉi ĝia revolucia karaktero estis tiom malmulte ekkonata, ke ĝi estis, male, enkondukita kiel rimedo por altigo kaj antaŭenigo de la varproduktado. Ĝi estiĝis en rekta ligo kun certaj jam ekzistintaj leviloj de la varproduktado kaj de la varinterŝanĝo: komercista kapitalo, metio, dunglaboro. Per tio, ke ĝi mem elpaŝis kiel nova formo de varproduktado, la alproprigaj formojn de la varproduktado restis ankaŭ por ĝi plene validaj.

En la varproduktado, tia kia ĝi estis evoluinta en la mezepoko, tute ne povis aperi la demando, al kiu la rezulto de la laboro apartenu. La unuopa produktisto ĝenerale estigis ĝin el krudmaterialo apartenanta al li, ofte mem produktitan, per propraj laborrimedoj kaj per propra manlaboro aŭ per tiu de sia familio. Ĝi tute ne bezonis esti alproprigata de li, ĉar ĝi sen tio tute apartenis al li. La proprieto je la produkto baziĝis do *sur propra laboro*. Eĉ tie, kie fremda helpo necesis, tiu restis ĝenerale flanka afero kaj tre ofte ricevis krom la salajron ankoraŭ aliajn kompensaĵojn: La gildaj metilernanto kaj submajstro laboris malpli pro nutraĵo kaj salajro ol pro sia propra elformiĝo al majstrecio. Jen venis la koncentriĝo de la produktadrimedoj en grandajn laborejojn kaj manufakturojn, ilia transformiĝo en efektive sociajn produktadrimedojn. Sed la sociaj produktadrimedoj kaj produktoj estis traktataj kvazaŭ ili estus nun kiel antaŭe la produktadrimedoj kaj produktoj de unuopuloj. Antaŭe la posedanto de la laborrimedoj alproprigis al si la produkton, ĉar ĝi estis ĝenerale lia propra produkto kaj fremda helplaboro la escepto; sed nun la posedanto de la laborrimedoj daŭre alproprigis al si la produkton, kvankam ĝi jam ne estis *lia* produkto, sed ekskluzive la pro-

dukto de *fremda laboro*. Do, la nun socie produktataj produktoj estis nun alproprigataj ne de tiuj, kiuj reale movis la produktadrimedojn kaj reale estigis la produktojn, sed de la *kapitalisto*. Produktadrimedoj kaj produktado fariĝis esence sociaj. Sed ili estas submetataj al formo de alproprigo, kies premiso estas la privata produktado de unuopuloj, ĉe kiu do ĉiu posedas sian propran produkton kaj surmerkatisas ĝin. La produktadmaniero estas submetata al tiu formo de alproprigo, kvankam ĝi nuligas ties premison.<sup>30</sup> En tiu kontraŭdiro, kiu donas al la nova produktadmaniero ĝian kapitalisman karakteron, *ĝerme jam kuŝas la tuta kolizio de la nuntempo*. Ju pli la nova produktadmaniero ekdominis sur ĉiuj decidaj kampoj de produktado kaj en ĉiuj ekonomie decidaj landoj kaj per tio forŝovis la unuopan produktadon escepte de sensignifaj restoj, *des pli akre devis ankaŭ aperi la neakordigeblo de socia produktado kaj kapitalisma alproprigo*.

La unuaj kapitalistoj jam trovis, kiel dirite, la ekzistantan formon de dunglaboro. Sed dunglaboro kiel escepto, kiel flanka okupiĝo, kiel okaza helpo, kiel provizoraĵo. La kamplaboristo, kiu iris dum kelka tempo dunglabori, havis siajn kelke da akreoj de propra grundo, per kiuj solaj li povis vivi, se necese. La gildaj ordoj zorgis pri tio, ke la submajstro de hodiaŭ transiris en la majstron de morgaŭ. Sed ekde kiam la produktadrimedoj estis transformitaj en sociajn kaj koncentritaj en la manojn de kapitalistoj, tio ŝanĝiĝis. La produktadrimedo kiel la produkto de la malgranda unuopa produktisto fariĝis pli kaj pli senvalora; al li restis jam neniam solvo ol iri al la kapitalisto por dunglabori. La dunglaboro, antaŭe escepto kaj okaza helpo, fariĝis la regulo kaj baza formo de la tuta produktado; antaŭe flanko okupiĝo, ĝi fariĝis nun ekskluziva agado de la laboristo. La portempa dunglaboristo transformiĝis en la vivolongan. La kvanto de vivolongaj dunglaboristoj estis kolose pliigita per la samtempa kolapso de la feŭda ordo, disiĝo de la sekvantaroj de la feŭdaj sinjoroj, forpelo de la kampuloj el

---

30 Ĉi tie ne necesas detale klarigi, ke, kvankam la formo de alproprigo restas la sama, la karaktero de la alproprigo ne estas malpli revoluciata de la supre montrita procezo ol la produktado. Ĉu mi alproprigas mian propran produkton aŭ la produkton de aliuloj, tio estas kompreneble du tre diversaj specoj de alproprigo. Preterpase: la dunglaboro, en kiu jam ĝerme troviĝas la tuta kapitalisma produktadmaniero, estas tre malnova; okaze kaj dise ĝi ekzistis dum jarcentoj apud la sklavlaboro. Sed la ĝermo povis disvolviĝi al kapitalisma produktadmaniero nur kiam la historiaj kondiĉoj estis donitaj.

iliaj bienetoj ktp. La disigo estis farita inter la produktadrimedoj koncentritaj en la manoj de la kapitalistoj unuflanke kaj la produktistoj reduktitaj al la posedo de nenio alia ol de sia laborforto aliflanke. *La kontraŭdiro inter socia produktado kaj kapitalisma alproprigo montriĝas kiel kontraŭeco de proletaro kaj burĝaro.*

Ni vidis, ke la kapitalisma produktadmaniero enŝoviĝis en socion de varproduktistoj, unuopaj produktistoj, kies socia kunteniĝo estis perata de la interŝanĝo de iliaj produktoj. Sed ĉia socio bazita sur varproduktado havas la apartecon, ke en ĝi la produktistoj perdis la regadon de siaj propraj sociaj rilatoj. Ĉiu produktas por si per siaj hazardaj produktadrimedoj kaj por sia aparta interŝanĝbezono. Neniu scias, kiom da liaj artikloj venas sur la merkaton, kiom da ili estas entute bezonataj, neniu scias, ĉu lia unuopa produkto trovas realan bezonon, ĉu li povos per tio rehavigi siajn kostojn aŭ ĉu li entute povos vendi. Regas anarĥio de la socia produktado. Sed la varproduktado, kiel ĉia alia produktadformo, havas siajn apartajn, imanentajn, de ĝi nedisigeblajn leĝojn; kaj tiuj leĝoj trudiĝas, spite al la anarĥio, en ĝi, per ĝi. Ili aperas en la unusola daŭre ekzistanta formo de la socia kunteniĝo, en la interŝanĝo, kaj trudiĝas kontraŭ la unuopa produktisto kiel devigaj leĝoj de la konkurenco. Ili estas do al la produktistoj komence mem nekonataj kaj estas nur per longa sperto iom post iom de ili mem malkovreblaj. Ili do trudiĝas, sen la produktistoj kaj kontraŭ la produktistoj, kiel blinde efikantaj naturleĝoj de sia produktadformo. La produkto regas la produktiston.

En la mezepoka socio, speciale en la unuaj jarcentoj, la produktado estis esence direktita al la memuzado. Ĝi kontentigis precipe nur la bezonojn de la produktisto kaj de lia familio. Kie, kiel en la kamparo, ekzistis personaj dependecrilatoj, ĝi ankaŭ kontribuis al kontentigo de la bezonoj de la feŭda sinjoro. Ĉe tio do ne okazis interŝanĝo, la produktoj pro tio ankaŭ ne alprenis la karakteron de varoj. La familio de la kampulo produktis ĉion, kion ĝi bezonis, ilojn kaj vestaĵojn ne malpli ol vivrimedojn. Nur kiam ĝi alvenis al situacio, en kiu ĝi produktis kromaĵon super sia propra bezono kaj super la naturaj tributoj ŝuldataj al la feŭda sinjoro, nur tiam ĝi produktis ankaŭ varojn; tiu kromaĵo, ĵetita en la socian interŝanĝon, proponata al vendo, fariĝis varo. La urbaj metiistoj tamen devis jam ĉe la komenco produkti por la interŝanĝo. Sed ankaŭ ili perlaboris la plej grandan parton de sia mem-

bezono mem; ili havis ĝardenojn kaj etajn kampojn; ili sendis sian brutaron en la komunuman arbaron, kiu krome liveris al ili konstrulignon kaj brul-lignon, la virinoj ŝpinis linon, lanon ktp. La produktado cele al interŝanĝo, la varproduktado, estis nur estiĝanta. Pro tio estis limigita interŝanĝo, limigita merkato, stabila produktadmaniero, loka fermiteco al la ekstero, loka kuniĝo interne; la markio<sup>31</sup> en la kamparo, la gildo en la urbo.

Sed kun la etendiĝo de la varproduktado, kaj speciale kun la apero de la kapitalisma produktadmaniero, efikis ankaŭ la ĝis tiam dormantaj leĝoj de la varproduktado pli videble kaj pli potence. La malnovaj ligiloj malstriktiĝis, la malnovaj fermaj baroj estis trarompataj, la produktistoj transformiĝis pli kaj pli en sendependajn unuopajn varproduktistojn. La anarĥio de la socia produktado aperis kaj estis pli kaj pli puŝata ĝisekstreme. Sed la ĉefa instrumento, per kiu la kapitalisma produktadmaniero kreskigis tiun anarĥion en la socia produktado, estis ĝuste la malo de la anarĥio: la kreskanta organizado de la produktado, kiel socia, en ĉiu unuopa produktad-establo. Per tiu levilo ĝi ĉesigis la malnovan pacan stabilecon. Kie ĝi estis enkondukita en industria branĉo, ĝi jam ne toleris malnovan metodon de produktado apud si. Kie ĝi alproprigis al si la metion, ĝi neniigis la malnovan metion. La laborkampoj fariĝis batalkampoj. La grandaj geografiaj malkovroj kaj la ilin sekvantaj koloniadoj multigis la vendoregionon kaj akcelis la transformadon de la metio en la manufakturon. Ne nur eksplodis la batalo inter la unuopaj lokaj produktistoj; la lokaj bataloj kreskis siavice al naciaj, al la komercaj militoj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. La granda industrio fine kaj la estigo de la mondmerkato faris la batalon universala kaj samtempe donis al ĝi senprecedencan akrecon. Inter unuopaj kapitalistoj kiel inter tutaj industrioj kaj tutaj landoj decidis la favoro de la naturaj aŭ kreitaj produktadkondiĉoj pri la ekzistado. La subiĝanto estas senkompate forigata. Tio estas la darvina batalo por la unuopa ekzistado, el la naturo kun potencigita furoro transigita en la socion. La natura starpunkto de la animalo aperas kiel pinto de la homa evoluo. La kontraŭdiro inter socia produktado kaj kapitalisma alproprigo prezentiĝas nun kiel *kontraŭeco inter la organizado de la produktado en la unuopa fabriko kaj la anarĥio de la produktado en la tuta socio*.

En tiuj du aperformoj de la per sia origino imanenta kontraŭdiro la

---

31 Vd la finan artikolon „La markio”. -mew

kapitalisma produktadmaniero moviĝas, iradas senelire tiun „eraran cirkuladon”, kiun jam Furiero malkovris en ĝi. Tio, kion Furiero siatempe tamen ankoraŭ ne povis vidi, estas, ke tiu cirkulado iom post iom striktiĝas, ke tiu moviĝo prezentiĝas pli ĝuste kiel spiralo kaj devas atingi sian finon, kiel tiu de la planedoj, per kolizio kun la centro. Estas la movforto de la socia anarĥio de la produktado, kiu pli kaj pli transformas la grandan plimulton de la homoj en proletojn, kaj estas siavice la proletaj amasoj, kiuj fine ĉesigos la anarĥion de la produktado. Estas la movforto de la socia produktad-anarĥio, kiu transformas la senfinan perfektigiĝkapablon de la maŝinoj de la granda industrio en absolutan devigon por ĉiu unuopa kapitalisto, pli kaj pli perfektigi sian maŝinaron, sub minaco de pereco.

Sed la perfektigo de la maŝinaro, tio signifas superfluigon de homlaboro. Se la enkonduko kaj pliigo de maŝinaro signifas elpuŝadon de milionoj da manlaboristoj per malmultaj maŝinlaboristoj, tiam plibonigo de la maŝinaro signifas elpuŝadon de pli kaj pli da maŝinlaboristoj mem kaj lastinstance la produktadon de nombro de disponeblaj dunglaboristoj, kiu superas la mezuman dungbezoon de la kapitalo, produktadon de kompleta industria rezervarmeo, kiel mi nomis ĝin jam en 1845,<sup>32</sup> disponebla por la tempoj, dum kiuj la industrio laboras plenpove, ĵetita surstraten per la nepre sekvanta bankrotado, ĉiutempe plumba pezo ĉe la piedoj de la laborista klaso en ĝia ekzistadbatalo kun la kapitalo, regulilo por teni la salajron sur la malalta nivelo taŭga por la kapitalisma bezono. Tiel okazas, ke la maŝinaro, por paroli kun Markso, fariĝas la plej potenca batalilo de la kapitalo kontraŭ la laborista klaso, ke la laborrimedo konstante elbatas la vivrimedon el la mano de la laboristo, ke la propra produkto de la laboristo transformiĝas en rimedon por servutigi la laboriston.<sup>33</sup>

„La leĝo [...], kiu tenas en ekvilibro la relativan superloĝantaron aŭ industrian rezervarmeon ĉiam kun la amplekso kaj la energio de la akumulado, forĝas la laboriston pli firme al la kapitalo ol la kejoj de Hefajsto Prometeon al la roko. Ĝi premias akumulado de mizero kongruan kun la akumulado de kapitalo. La akumulado de riĉaĵo sur unu poluso estas do samtempe akumulado de mizero, de labortorturo, de sklaveco, de nesciado, de brutaligo kaj de morala degradado sur

32 Friedrich Engels: „Lage der arbeitenden Klasse in England” [Frederiko Engelso: „Situacio de la laboranta klaso en Anglio”], p. 109.

33 Vd Karlo Markso: La kapitalo ..., Unua volumo, [Librolisto n-ro 68], p. 406s. kaj 457.

ĝia kontraŭa poluso, t.e. flanke de la klaso, kiu *produktas sian propran produkton kiel kapitalon*.<sup>34</sup>

Kaj atendi de la kapitalisma produktadmaniero alian distribuadon de la produktoj, signifus postuli, ke la elektrodoj de baterio lasu la akvon en ne malkombinita stato tiom longe, kiom ili kontaktiĝas kun la baterio, kaj ke ili ne disvolvigu ĉe la pozitiva poluso oksigenon kaj ĉe la negativa hidrogenon.

Ni vidis, ke la plej kreskigita plibonigeblo de la moderna maŝinaro, per la anarĥio de la produktado en la socio, transformiĝas en absolutan devigon por la unuopa industri-kapitalisto konstante plibonigi sian maŝinaron, konstante altiĝi ĝian produktadforton. En saman absolutan devigon transformiĝas por li la nura fakta ebleco etendi sian produktadkampon. La eksterordinara etendiĝoforto de la granda industrio, kontraŭ kiu tiu de la gasoj estas vera infanludo, montriĝas al ni nun kiel kvalita kaj kvanta etendiĝbezono, kiu mokas ĉian kontraŭpremon. La kontraŭpremo konsistas el la konsumado, la vendo, la merkatoj por la produktoj de la granda industrio. Sed la etendiĝkapablo de la merkatoj, malintensaj kiel intensaj, estas regata unue de tute aliaj leĝoj, kiuj multe malpli energie efikas. La etendiĝo de la merkatoj ne povas teni la paŝon kun la etendiĝo de la produktado. La kolizio fariĝas neevitebla, kaj ĉar ĝi ne povas produkti solvon, tiom longe kiom ĝi ne rompas la kapitalisman produktadmanieron mem, ĝi fariĝas perioda. La kapitalisma produktado produktas novan „eraran cirkuladon”.

Efektive, ekde 1825, kiam la unua ĝenerala krizo eksplodis, la tuta industria kaj komerca mondo, la produktado kaj la interŝanĝo de ĉiuj civilizitaj popoloj kaj de iliaj pli aŭ malpli barbaraj<sup>35</sup> aneksaĵoj, proksimume ĉiujn dek jarojn plene malordiĝas. La cirkulado blokiĝas, la merkatoj estas superplenaj, la produktoj kuŝas tie, same amase kiel nevendeblo, la kontanta mono fariĝas nevidebla, la kredito malaperas, la fabrikoj stagnas, la laborantaj amasoj malhavas vivrimedojn, ĉar ili produktis tro da vivrimedoj. Bankroto sekvas al bankroto, deviga vendo al deviga vendo. La blokiĝo daŭras jarojn, produktadfortoj kaj produktoj estas amase malŝparataj kaj detruataj, ĝis kiam la akumulitaj varamasoj kun pli aŭ malpli granda sen-

34 Karlo Markso: La kapitalo, Unua volumo, [Librolisto n-ro 68], p. 604.

35 „Civilizita” kaj „barbara” estas ĉe Engelso nocioj de evoluŝtupoj de la homaro, vd Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato [Librolisto n-ro 26].



valoriĝo fine defluas, ĝis kiam produktado kaj interŝanĝo iom post iom rekomenciĝas. Iom post iom la irado rapidiĝas, transiras en troton, la industria troto transiras en galopon, kaj tiu siavice pliiĝas ree ĝis tiu senbrida kurgalopo de kompleta industria, komerca, kredita kaj spekula obstaklovetkuro, por fine post la plej kolrompaj saltoj ree atingi la foson de la bankroto. Kaj tiel ĉiam denove. Tion ni nun de 1825 travivis kvin fojojn kaj en tiu ĉi momento (1877) ni travivas ĝin la sesan fojon. Kaj la karaktero de tiuj krizoj estas tiom akra, ke Furiero trafis ilin ĉiujn, kiam li nomis la unuan: crise pléthorique, krizo pro abundo.

En la krizoj la kontraŭdiro inter socia produktado kaj kapitalisma alproprigo perforte eksplodas. La varcirkulado estas en la momento neniigita: la cirkuladrimedo, la mono, fariĝas la malhelpo al cirkulado; ĉiuj leĝoj de la varproduktado kaj varcirkulado estas metitaj surkapen. La ekonomia kolizio atingis sian apogeon: *La produktadmaniero ribelas kontraŭ la interŝanĝmaniero.*

La fakto, ke la socia organizado de la produktado ene de la fabriko evoluis al tiu punkto, en kiu ĝi fariĝis neakordigebla kun la apud ĝi kaj super ĝi ekzistanta anarĥio de la produktado en la socio - tiu fakto fariĝas por la kapitalistoj palpebla per la perforta koncentriĝo de la kapitaloj, kiu okazas dum la krizoj per la ruiniĝo de multaj grandaj kaj eĉ pli da malgrandaj kapitalistoj. La tuta meĥanismo de la kapitalisma produktadmaniero ĉesas funkcii sub la premo de la produktadfortoj, kiujn ĝi mem produktis. Ĝi jam ne povas transformi ĉiujn el tiu amaso de produktadrimedoj en kapitalon; ili kuŝas neuzataj, kaj ĝuste pro tio ankaŭ la industria rezervarmeo devas kuŝi neuzata. Produktadrimedoj, vivrimedoj, disponeblaj laboristoj, ĉiuj elementoj de produktado kaj de ĝenerala riĉeco ekzistas abunde. Sed „la abundo fariĝas fonto de mizero kaj de manko” (Furiero), ĉar ĝuste ĝi malebligas la transformadon de la produktad- kaj vivrimedoj en kapitalon. Ĉar en la kapitalisma socio la produktadrimedoj ne povas ekagi, se ili ne antaŭe transformiĝis en kapitalon, en rimedon por ekspluati homan laborforton. Kvazaŭ fantomo la neceso de la kapitaleco de la produktad- kaj vivrimedoj staras inter ili kaj la laboristoj. Ĝi sole malebligas la kuniĝon de la aĵaj kaj de la personaj leviloj de la produktado; ĝi sole malpermesas al la produktadrimedoj funkcii, al la laboristoj labori kaj vivi. Unuflanke do pruvigas la propra nekapablo de la kapitalisma produktad-

maniero je plua administrado de tiuj produktadfortoj. Aliflanke tiuj produktadfortoj mem premas kun kreskanta forto por forigo de la kontraŭdiro, por sia elsaviĝo el sia kapitaleco, por *efektiva agnosko de ilia karaktero kiel sociaj produktadfortoj*.

Estas tiu kontraŭpremo de la potence kreskantaj produktadfortoj kontraŭ sia kapitaleco, tiu kreskanta devigo agnoski ilian socian naturon, kiu devigas la kapitalistan klason mem, pli kaj pli, kiom tio entute eblas ene de la kapitalrilato, trakti ilin kiel sociajn produktadfortojn. La periodo de industria alta premo kun sia senlima kreditpufiĝo same kiel la bankroto mem per la kolapso de grandaj kapitalismaj establoj, ambaŭ puŝas al tiu formo de sociigo de plej grandaj amasoj de produktadrimedoj, kiu montriĝas al ni en la diversaj specoj de akciosocietoj. Kelkaj el tiuj produktad- kaj cirkuladrimedoj estas dekomence tiom kolosaj, ke ili, ekz-e la fervojoj, ekskludas ĉian alian formon de kapitalisma ekspluatado. Sur certa evoluŝtupo ankaŭ tiu formo jam ne sufiĉas; la enlandaj grandproduktistoj de unu sama industribranĉo unuiĝas al „trusto”, unuiĝo kun la celo reguligi la produktadon; ili determinas la produktandan kvanton, dividas ĝin inter si kaj tiel devigas la antaŭe fiksitajn vendoprezon. Sed ĉar tiaj trustoj ĉe la unua malbona negocotempo plej ofte disfalas, ili ĝuste per tio pelas al eĉ pli koncentrita sociigo: La tuta industribranĉo transformiĝas en unu solan grandan akciosocieton, la enlanda konkurenco cede la lokon al la enlanda monopolo de tiu sola societo; tio okazis ekz-e ankoraŭ 1890 al la angla produktado de alkalo, kiu nun, post kunfandiĝo de ĉiuj 48 grandaj fabrikoj, funkcias en la mano de unu sola, unuece gvidata societo kun kapitalo de 120 milionoj da markoj.

En la trustoj la libera konkurenco transformiĝas en monopolon, la senplana produktado de la kapitalisma socio kapitulacas antaŭ la laŭplana produktado de la enrompiĝanta socialisma socio. Tamen unue ankoraŭ profite al la kapitalistoj. Sed ĉi tie la ekspluatado fariĝas tiom palpebla, ke ĝi devas kolapsi. Neniu popolo tolerus produktadon gvidatan de trustoj, tiom senvualan ekspluatadon de la tutaĵo fare de eta bando de dividendaj profituloj.

Per ia aŭ alia maniero, kun aŭ sen trustoj, fine la oficiala reprezentanto de la kapitalisma socio, la ŝtato, devas transpreni la gvidadon de la produkt-

ado.<sup>36</sup> Tiu neceso de transformado en ŝtatan proprieton aperas unue ĉe la grandaj trafikaj instalaĵoj: poŝto, telegrafoj, fervojoj.

Dum la krizoj malkaŝis la nekapablon de la burĝaro je plua mastrumado de la modernaj produktadfortoj, la transformo de la grandaj produktad- kaj trafik-institucioj en akcisetiojn, trustojn kaj ŝtatan proprieton montras la malneceson de la burĝaro por tiu celo. Ĉiuj sociaj funkcioj de la kapitalisto estas nun plenumataj de pagataj dungitoj. La kapitalisto jam ne havas socian aktivecon, krom la enspezadon de profitoj, de dividendoj kaj ludado ĉe la borso, kie la diversaj kapitalistoj forprenas al si reciproke sian kapitalon. Dum la kapitalisma produktadmaniero unue elŝovis laboristojn, ĝi elŝovas nun la kapitalistojn, tute kiel la laboristojn, kaj ŝovas ilin en la superfluan loĝantaron, kvankam unue ankoraŭ ne en la industriar rezerveon.

Sed nek la transformado en akcisetiojn kaj trustojn nek tiu en ŝtatan proprieton forigas la kapitalecon de la produktadfortoj. Ĉe la akcisetioj kaj trustoj tio evidentas. Kaj la moderna ŝtato estas ree nur la organizaĵo, kiun la burĝa socio donas al si por daŭrigi la ĝenerale eksterajn kondiĉojn de la kapitalisma produktadmaniero kontraŭ entrudiĝoj de la laboristoj kiel ankaŭ de unuopaj kapitalistoj. La moderna ŝtato, kia ajn estas ĝia formo, estas esence kapitalisma maŝino, ŝtato de la kapitalistoj, la idea ĉiomkapital-

---

36 Mi diras: devas. Ĉar nur en la kazo, ke la produktad- aŭ cirkulad-rimedoj estas *reale* elkreskintaj el la gvidado de la akcisetioj, ke do la ŝtatigo fariĝis neevitebla, nur en tiu kazo ĝi signifas, ankaŭ se la hodiaŭa ŝtato plenumas ĝin, ekonomian intervenon, la atingon de nova antaŭŝtupo por alproprigo de ĉiuj produktadfortoj fare de la socio mem. Sed lastatempe, ekde kiam Bismarko uzas ŝtatigojn, aperis ia falsa socialismo kaj ie kaj tie degeneris en ian komplezemon, kiu deklaras *ĉian* ŝtatigon, eĉ la bismarkan, senhezite kiel socialisman. Nu, se la ŝtatigo de la tabako estus socialisma, tiam Napoleono kaj Metternich troviĝus inter la fondintoj de socialismo. Ke la belga ŝtato pro tute ordinaraj politikaj kaj financaj kialoj konstruis siajn ĉefajn fervojojn mem, ke Bismarko sen ajna ekonomia neceso ŝtatigis la ĉefajn fervojliniojn de Prusio, simple por povi ilin por la kazo de milito pli bone aranĝi kaj utiligi, por eduki la fervoj-oficistojn al voĉdon-brutaro por la registaro kaj ĉefe por krei al si novan enspezofonton sendependan de parlamentaj decidoj - tio ne estis socialismaj paŝoj, rektaj aŭ malrektaj, konsciaj aŭ nekonsciaj. Alie ankaŭ la reĝa markomercio, la reĝa porcelan-manufakturo kaj eĉ la kompani-tajloristo ĉe la armeo estus socialismaj instalaĵoj aŭ eĉ la sub Frederiko Vilhelmo la 3-a en la 1830-aj jaroj de ruzulo tutserioze proponita ŝtatigo de la - bordeloj.

isto. Ju pli da produktadfortoj ĝi transprenas en sian proprion, des pli ĝi fariĝas reala ĉiomkapitalisto, des pli da civitanoj ĝi ekspluatas. La laboristoj restas dunglaboristoj, proletoj. La kapitalrilato ne estas nuligata, ĝi estas, male, ekstremigata. Sed en la ekstremo ĝi transformiĝas. La ŝtata proprieto je la produktadfortoj ne estas solvo de la konflikto, sed ĝi entenas en si la formalan rimedon, la uzeblecon de la solvo.

Tiu solvo povas konsisti nur en tio, ke la socia naturo de la modernaj produktadfortoj estas efektive agnoskata, ke do la produktad-, alproprig- kaj interŝanĝ-maniero estas harmoniigata kun la socia karaktero de la produktadrimedoj. Kaj tio povas okazi nur per tio, ke la socio malkaŝe kaj sen ĉirkaŭvojoj alproprigas al si la produktadfortojn, kiuj transkreskis ĉian alian gvidadon ol tiun de la socio. Per tio la socia karaktero de la produktadrimedoj kaj de la produktoj, kiu hodiaŭ turniĝas kontraŭ la produktistoj mem, kiu periode trarompas la produktad- kaj interŝanĝ-manieron kaj trudiĝas nur perforte kaj detruie kiel blinde efikanta naturleĝo, estas de la produktistoj plenkonscie respektigata kaj transformiĝas el kaŭzo de perturbo kaj de perioda kolapso en la potencon levilon de la produktado mem.

La socie efikantaj fortoj efikas tute same kiel la naturfortoj: blinde, perforte, detruie, tiom longe kiom ni ne ekkonas ilin kaj ne kalkulas je ili. Sed ekde kiam ni ekkonis ilin, komprenis ilian agadon, iliajn direktojn, iliajn efikojn, tiam dependas nur de ni, por submeti ilin pli kaj pli al nia volo kaj pere de ili atingi niajn celojn. Kaj tio ĝustas tute speciale pri la nuntempaj potencaj produktadfortoj. Tiom longe, kiom ni obstine rifuzas kompreni ilian karakteron - kaj kontraŭ tiu kompreno defendas sin la kapitalisma produktadmaniero kaj iliaj defendantoj -, tiom longe tiuj fortoj efikas, spite al ni, kontraŭ ni, tiom longe ili dominas nin, kiel ni detale priskribis. Sed ekde kiam ilia naturo estas komprenita, en la manoj de la asociiĝintaj produktistoj ili transformeblas el demonaj despotoj en komplezajn servistojn. Tio estas la diferenco inter la detrua forto de la elektro en la fulmo de fulmotondro kaj la bridita elektro de la telegrafo kaj de la lum-arko; la diferenco de incendia fajrego kaj de la fajro efikanta en la servo al la homo. Per tiu traktado de la hodiaŭaj produktadfortoj laŭ ilia fine konata naturo paŝas en la lokon de la socia produktad-anarĥio socie laŭplana regulado de la produktado laŭ la bezonoj de ĉiuj kiel de ĉiu unuopulo. Per tio la kapitalisma alproprigmaniero, en kiu la produkto servutigas unue la produktiston,

sed poste ankaŭ la alpropriganton, estas anstataŭigata per tiu alproprigmaniero de la produkto, kiu baziĝas sur la naturo de la modernaj produktadrimedoj mem: unuflanke rekta socia alproprigo kiel rimedo por daŭrigado kaj etendado de la produktado, aliflanke rekta individua alproprigo kiel vivkaj ĝu-rimedo.

Per tio, ke la kapitalisma produktadmaniero pli kaj pli transformas la grandan plimulton de la loĝantaro en proletojn, ĝi kreas la potencon, kiu estas devigata, sub minaco de pereco, plenumi tiun transformegon. Per tio, ke ĝi pli kaj pli premas al transformo de la grandaj sociigitaj produktadrimedoj en ŝtatan proprieton, ĝi montras mem la vojon por plenumi la transformegon. *La proletaro alprenas al si la ŝtatan potencon kaj transformas la produktadrimedojn unue en ŝtatan proprieton.* Sed per tio ĝi neniigas sin mem kiel proletaron, per tio ĝi neniigas ĉiajn klasajn diferencojn kaj klasajn kontraŭecojn kaj per tio ankaŭ la ŝtaton kiel ŝtaton. La ĝisnuna socio moviĝanta en klasaj kontraŭecoj bezonis la ŝtaton, t.e. organizaĵon de la respektiva ekspluatanta klaso por daŭrigi siajn eksterajn produktadkondiĉojn, do speciale por perforta tenado de la ekspluatata klaso en la per la ekzistanta produktadmaniero donitaj kondiĉoj de subpremado (sklaveco, servuteco, dunglaboro). La ŝtato estis la oficiala reprezentanto de la tuta socio, ĝia kuniĝo en videbla institucio, sed ĝi estis tia nur en la mezuro en kiu ĝi estis la ŝtato de tiu klaso, kiu eĉ por sia tempo reprezentis la tutan socion: en la antikveco, ŝtato de la sklavposedaj civitanoj, en la mezepoko de la feŭda nobelaro, en nia tempo de la burĝaro. Per tio, ke ĝi fine fariĝas efektive la reprezentanto de la tuta socio, ĝi superfluigas sin mem. Ekde kiam jam ne estas socia klaso tenenda en subpremado, ekde kiam kun la klasa regado kaj kun la batalo por la individua ekzistado - okazanta pro la ĝisnuna anarĥio de la produktado - ankaŭ la el ĝi fontantaj kolizioj kaj ekscesoj estas forigitaj, jam ne ekzistas io subpremenda kio necesigus apartan subpremforton, ŝtaton. La unua ago, per kiu la ŝtato aperas reale kiel reprezentanto de la tuta socio - la ekposedo de la produktadrimedoj nome de la socio - estas samtempe ĝia lasta memstara ago kiel ŝtato. La interveno de ŝtata potenco en sociajn rilatojn fariĝas sur unu kampo post la alia superflua kaj poste per si mem endormiĝos. En la lokon de regado super personoj paŝas la administrado de aĵoj kaj la gvidado de produktadprocezoj. La ŝtato ne estas „abolata”, ĝi formortas. Laŭ tio oni mezuru la frazon pri la „libera popolŝtato”, laŭ ĝia portempa agitata praveco kiel laŭ ĝia definitiva scienca

neadekvateco; laŭ tio ankaŭ la postulon de la tiel nomataj anarĥiistoj, ke la ŝtato estu tuj forigota.

La alproprigo de ĉiuj produktadrimedoj fare de la socio estis, ekde la apero de la kapitalisma produktadmaniero, la ideo de unuopuloj kiel de tutaj sektoj, kiuj ofte pli aŭ malpli malklare konceptis ĝin kiel idealon por la estonteco. Sed ĝi povis fariĝi ebla, fariĝi historia nepreco nur kiam la faktaj kondiĉoj por ilia realigado ekzistis. Ĝi, kiel ĉiu alia socia progreso, fariĝas realigebla ne per la ekkompreno, ke la ekzisto de klasoj kontraŭdiras la justecon, la egalecon ktp, ne per la nura volo forigi tiujn klasojn, sed per certaj novaj ekonomiaj kondiĉoj. La fendiĝo de la socio en ekspluatantan kaj ekspluatatan, en regantan kaj subprematan klason estis la nepra sekvo de la antaŭa malalta evoluo de la produktado. Tiom longe, kiom la socia ĉiom-laboro liveras nur produkton, kiu nur malmulte superas la kvanton necesan por nura ekzistado, tiom longe, kiom do la laboro okupas ĉiun aŭ preskaŭ ĉiun tempon de la granda plimulto de la socianoj, tiom longe tiu socio nepre dividiĝas en klasojn. Apud la granda plimulto, kiu dediĉas sin ekskluzive al laboro estiĝas klaso liberigita el rekta produktiva laboro, kiu prizorgas la komunajn aferojn de la socio: labordivido, ŝtataj aferoj, justeco, sciencoj, artoj ktp. Estas do la leĝo de labordivido, sur kiu la klasa divido baziĝas. Sed tio ne malhelpas, ke tiu divido en klasojn ne estas trudita per perforto kaj rabo, ruzo kaj trompo kaj ke la reganta klaso, ekde sia regado, neniam preterlasis firmigi sian regadon surkoste de la laboranta klaso kaj transformi la socian gvidadon en kreskantan ekspluatadon de la amasoj.

Sed kvankam laŭ tio la divido en klasojn havas ian historian pravecon, ĝi havas tiun tamen nur por donita tempo, por donitaj sociaj kondiĉoj. Ĝi okazis pro la nesufiĉo de la produktado; ĝi estas forbalaota per la plena disvolvado de la produktadfortoj. Kaj efektive la forigo de la sociaj klasoj premas historian evolugradon, sur kiu la ekzisto de ne nur tiu aŭ alia reganta klaso, sed de reganta klaso entute, do de la klasa diferenco mem, fariĝis anakronismo, fariĝis arĥaĝinta. Ĝi premisas do altan gradon de la disvolvado de la produktado, sur kiu alproprigo de la produktadrimedoj kaj de la produktoj kaj per tio de la politika regado, de la monopolo de klerigo kaj de spirita gvidado fare de aparta socia klaso fariĝis ne nur superflua, sed ankaŭ ekonomie, politike kaj intelekte obstaklo por la disvolvado. Tiu punkto estas nun atingita. Dum la politika kaj intelekta bankroto de la

burĝaro estas al ĝi jam apenaŭ sekreto, ĝia ekonomia bankroto ripetiĝas regule ĉiujn dek jarojn. En ĉiu krizo la socio sufokiĝas sub la bato de siaj propraj, por ĝi neuzebaj produktadfortoj kaj produktoj kaj staras senhelpe antaŭ la absurda kontraŭdiro, ke la produktistoj havas nenion por konsumi, ĉar mankas konsumantoj. La ekspansiforto de la produktadrimedoj rompas la ligilojn, kiujn la kapitalisma produktadmaniero metis al ĝi. Ĝia liberigo el tiuj ligiloj estas la sola premiso de seninterrompa, ĉiam pli rapide progresanta evoluo de la produktadfortoj kaj per tio de praktike senbara pliiĝo de la produktado mem. Sed eĉ pli. La socia alproprigo de la produktadrimedoj forigas ne nur la nun ekzistantan artefaritan malhelpon de la produktado, sed ankaŭ la pozitivan malŝparon kaj detruadon de produktadfortoj kaj produktoj, kiu estas nuntempe la neevitebla akompananto de la produktado kaj kiu atingas sian kulminon en la krizoj. Ĝi krome liberigas amason da produktadrimedoj kaj produktoj por la tutaĵo [de la loĝantaro] per forigo de la freneza malŝparo per lukso de la nun regantaj klasoj kaj de iliaj politikaj reprezentantoj. La ebleco certigi per la socia produktado al ĉiuj socioj ekzistadon, kiu ne nur estas materie plene sufiĉa kaj kiu ĉiutage pli riĉiĝas, sed kiu garantias al ili ankaŭ la komplete liberan instruadon kaj uzadon de iliaj korpaj kaj spiritaĵoj talentoj, tiu ebleco ekzistas nun por la unua fojo, sed ĝi ekzistas.<sup>37</sup>

Per la alproprigo de la produktadrimedoj fare de la socio la varproduktado estas forigita kaj per tio la regado de la produkto super la produktistoj. La anarĥio ene de la socia produktado estas anstataŭigata per laŭplana konscia organizado. La batalo por la individua ekzistado ĉesas. Per tio la

37 Kelkaj nombroj donu proksimuman imagon pri la eksterordinara ekspansiforto de la modernaj produktadrimedoj, eĉ sub la kapitalisma premo. Laŭ la kalkulo de Giffen la ĉioma riĉaĵo de Grandbritio kaj Irlando en rondigita nombro:

1814: 2.200 milionoj da sterlingaj pundoj	= 44 miliardoj da markoj
1865: 6.100 milionoj da sterlingaj pundoj	= 122 miliardoj da markoj
1875: 8.500 milionoj da sterlingaj pundoj	= 170 miliardoj da markoj

Koncerne la detruadon de produktadrimedoj kaj produktoj en la krizoj, en la 2-a kongreso de germanaj industriistoj, Berlino, la 21-an de februaro 1878, la totala perdo nur de la germana ferindustrio en la lasta krizo estis kalkulita je 455 milionoj da markoj.

homo certasence eliras definitive el la animala regno, elpaŝas el la animalaj ekzistkondiĉoj en reale homajn. La rondo de la vivkondiĉoj, kiuj ĉirkaŭas la homon kaj kiuj ĝis nun regis la homon, venas nun sub la regadon kaj kontroladon de la homoj, kiuj fariĝas por la unua fojo konsciaj, realaj mastroj de la naturo, ĉar ili - kaj per tio ke ili - fariĝas mastroj de sia propra sociiĝo. La leĝoj de sia propra socia agado, kiuj ĝis nun staris kontraŭ ili kiel fremdaj, ilin regantaj naturleĝoj, estas tiam de la homoj aplikataj kun plena fakscio kaj per tio regataj. La propra sociiĝo de la homoj, kiu ĝis nun staris kontraŭ ili kiel trudita al ili de la naturo kaj de la historio, fariĝas nun libera ago. La objektivaj, fremdaj potencoj, kiuj ĝis nun regis la historion, venas sub la kontroladon de la homoj mem. Nur ekde tiam la homoj faros plenkonscie sian historion mem, nur ekde tiam la de ili ekmovataj sociaj kaŭzoj havos precipe kaj en ĉiam kreskanta mezuro ankaŭ la de ili volatajn efikojn. Tio estas la salto de la homaro el la regno de la neceso en la regnon de la libero.

Ni fine mallonge resumu nian argumentadon:

1. *Mezepoka socio*: Malgranda unuopa produktado. Produktadrimedoj konceptitaj por individua uzado, pro tio originaj-malperfektaj, etskalaj, etefikaj. Produktado por la rekta konsumo, ĉu de la produktanto mem, ĉu de lia feŭda sinjoro. Nur tie, kie okazas kromaĵo de produktado super tiu konsumo, tiu kromaĵo estas proponata al vendo kaj iras en la interŝanĝon: varproduktado do nur estiĝanta; sed jam nun ĝi entenas ĝerme *la anarhion en la socia produktado*.

2. *Kapitalisma revolucio*: Transformado de la industrio unue per la simpla kunlaborado kaj de la manufakturo, koncentrado de la ĝis nun disaj produktadrimedoj en grandajn laborejojn, per tio ilia transformado el produktadrimedoj de la unuopulo en sociajn - transformado, kiu ĝenerale ne tuŝas la formon de la interŝanĝo. La malnovaj formoj de alproprigoj restas validaj. La *kapitalisto* aperas: En sia eco kiel proprietulo de la produktadrimedoj li alproprigas al si ankaŭ la produktojn kaj varigas ilin. La produktado fariĝis socia ago; la interŝanĝo kaj kun ĝi la alproprigado restas individuaj agoj, agoj de la unuopulo: *La socia produkto estas alproprigata de la unuopa kapitalisto*. Baza kontraŭdiro, el kiu ĉiuj kontraŭdiroj fontas, en kiu la hodiaŭa socio moviĝas kaj kiujn la granda industrio klare montras.



- A. Disigo de la produktisto disde la produktadrimedoj. Kondamno de la laboristo al vivolonga dunglaboro. *Kontraŭeco de proletaro kaj burĝaro.*
- B. Kreskanta aperado kaj kreskanta efikeco de la leĝoj, kiuj regas la varproduktadon. Senbrida konkurencbatalo. *Kontraŭdiro de la socia organizado en la unuopa fabriko kaj de la socia anarĥio en la ĉiomproduktado.*
- C. Unuflanke perfektigo de la maŝinaro, per kiu la konkurenco fariĝas absoluta devigo por ĉiu individua fabrikisto kaj kiu signifas ĉiam kreskantan senlaborigon de laboristoj: industria rezervarmeo. Aliflanke senbara etendo de la produktado, ankaŭ deviga leĝo de konkurenco por ĉiu fabrikisto. De ambaŭ flankoj senprecedenca disvolvado de la produktadfortoj, supereco de la propono super la postulo, superproduktado, tropleniĝo de la merkatoj, dekjaraj krizoj, erara cirkulado: Abundo ĉi tie, de produktadrimedoj kaj produktoj - abundo tie, de laboristoj sen laboro kaj sen ekzistadrimedoj; sed tiuj du leviloj de la produktado kaj de socia prospero ne povas kuniĝi, ĉar la kapitalisma formo de la produktado malpermesas al la produktadfortoj efiki, al la produktoj cirkuli, escepte se ili antaŭe transformiĝis en kapitalon: ĝuste tion ilia propra abundo malebligas. Tiu kontraŭdiro grandiĝis al absurdo: *La produktadmaniero ribelas kontraŭ la interŝanĝformo.* La burĝaro estas konviktita pri nekapablo plue gvidi siajn proprajn sociajn produktadfortojn.
- Ĉ. Parta agnosko de la socia karaktero de la produktadfortoj, trudata al la kapitalistoj mem. Alproprigo de la grandaj produktadkaj cirkulad-organoj, unue per *akcisocietoj*, poste per *trustoj*, poste per la *ŝtato*. La burĝaro pruviĝas kiel superflua klaso; ĉiuj ĝiaj sociaj funkcioj estas nun plenumataj de pagataj dungitoj.

3. *Proletara revolucio*, solvo de la kontraŭdiroj: La proletaro transprenas la publikan potencon kaj transformas per tiu potenco la sociajn produktadrimedojn, kiuj elĝlitas el la manoj de la burĝaro, en publikan proprion. Per tiu ago ĝi liberigas la produktadrimedojn el ilia ĝisnuna kapitaleco kaj donas al ilia socia karaktero plenan liberecon trudiĝi. Socia produktado laŭ

antaŭdifinita plano fariĝas nun ebla. La disvolvado de la produktado igas la pluan ekzistadon de diversaj sociaj klasoj anakronismo. En la mezuro, en kiu la anarĥio de la socia produktado malaperas, ankaŭ la politika aŭtoritato de la ŝtato endormiĝas. La homoj, fine mastroj de sia propra maniero de sociigo, fariĝas per tio samtempe mastroj de la naturo, mastroj de si mem - liberaj.

Plenumi tiun mondliberigan agon estas la historia alvokiteco de la moderna proletaro. Esplori ĝiajn historiajn kondiĉojn kaj per tio ĝian naturon mem kaj tiel konsciigi al la hodiaŭ subpremata klaso la kondiĉojn kaj la naturon de ĝia propra ago estas la tasko de la teoria esprimo de la proletara movado, de la scienca socialismo.

## Frederiko Engelso: La markio

*Verkita de meze de septembro ĝis meze de decembro 1882. Unuafoje publikigita kiel anekso al la verko „Die Entwicklung des Sozialismus von der Utopie zur Wissenschaft [La evoluo de la socialismo de utopio al scienco]”, Hottingen-Zuriko, 1882. Laŭ la kvara, kompletigita eldono.*

*Esperanta traduko el la germana laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlino, Volumo 19, 4-a eldono 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 315-330, reta versio de MLWerke.de (stato: 1999-07-18)*

En lando kia Germanio, kie ankoraŭ pli ol la duono de la loĝantaro vivas per kampkulturo, necesas ke la socialistaj laboristoj kaj pere de ili la kamparanoj eksciu, kiel la hodiaŭa grundproprietulo, granda kiel malgranda, estiĝis; necesas, ke oni al la hodiaŭa mizero de la taglaboristoj kaj al la hodiaŭa ŝuldservuto de la etkampuloj kontrastigu la praan komunuman proprieton de ĉiuj liberaj viroj je tio, kio tiam estis por ili envere „patrujo”, heredita libera komunuma posedo. Mi donas do mallongan historian prezenton de tiu praa germana grund-konstitucio, kiu en etaj restoj konserviĝis ĝis hodiaŭ, sed kiu dum la tuta mezepoko servis kiel bazo kaj modelo de ĉia publika konstitucio kaj kiu trapenetris la tutan publikan vivon, ne nur en Germanio, sed ankaŭ en norda Francio, Anglio kaj Skandinavio. Kaj tamen ĝi povis esti tiom forgesita, ke nur lastatempe G. L. Maurer devis nove malkovri ĝian realan gravecon.

Du sponte estiĝintaj faktoj regas la prahistorion de ĉiuj aŭ de tamen preskaŭ ĉiuj popoloj: divido de la popolo laŭ parenceco kaj komunuma propio. Tia estis la situacio ankaŭ ĉe la germanoj. Kiel ili estis kunportintaj el Azio la dividon laŭ triboj, klanoj, gentoj, kiel ili ankoraŭ tempe de la romanoj formis siajn batalgrupojn tiel, ke ĉiam plejparencoj staris ŝultron ĉe ŝultro, tiel tiu divido regis ankaŭ la ekposedon de la nova regiono oriente de Rejno kaj norde de Danubo. Sur la nova loko ĉiu tribo ekloĝis, ne laŭ kaprico aŭ hazardo, sed, kiel Cezaro eksplicite indikas, laŭ la genta parenceco de la tribanoj. Al la pli parencaj grandaj grupoj oni atribuis certan distrikton, en kiu siavice la unuopaj gentoj, kiuj ampleksis certan nombron da familioj, ekloĝis vilaĝope. Pluraj parencaj vilaĝoj konsistigis centopon (malnovgermane: *huntari*, malnovnorde: *heradh* [germane: *Hundertschaft*]), pluraj centopoj konsistigis provincon [germane: *Gau*]; la tutaĵo de la provincoj estis la popolo mem. La grundo, kiun la vilaĝo ne okupis, restis al la dispono de la centopo; kio ne estis atribuita al tiu, restis al la provinco; kio estis krom tio disponebla - plej ofte tre granda teritorio - restis en la rekta

posedo de la tuta popolo. Tiel ni trovas en Svedio ĉiujn ĉi diversajn ŝtupojn de komuna posedo unu apud la alia. Ĉiu vilaĝo havis vilaĝan komungrundon (*bys almänningar*), kaj apud ĝi ekzistis grundo de centopo (*härads*), de provinco (*lands*) kaj fine tiu de la popolo, kiun la reĝo kiel reprezentanto de la tuta popolo administras, tie do nomata *konungs almännigar*. Sed ili ĉiuj, ankaŭ la reĝa, nomiĝis sendistinge *almännigar*, [germane:] *Allmenden*, komunaj grundoj.

Se la malnovsveda ordo de la komuna grundo, kiu en sia preciza subdivido ĉiukaze apartenas al posta evoluŝtupo, iam ekzistis en Germanio, tiam ĝi estis baldaŭ malaperinta. La rapida pliiĝo de la loĝantaro kreis sur la tre etendita teritorio atribuita al ĉiu unuopa vilaĝo, la markio, certan nombron da idaj vilaĝoj, kiuj nun konsistigis kun la malida<sup>38</sup> vilaĝo kiel egalrajtaj aŭ malpli rajtaj unu solan markian komunumon, tiel ke ni en Germanio, laŭ tio, kion la plej malnovaj fontoj indikas, trovas ĉie pli aŭ malpli grandan nombron da vilaĝoj kunigitaj en unu markia komunumo. Sed super tiuj komunumoj staris, almenaŭ en la unua tempo, ankoraŭ la pli grandaj markiaj komunumoj de la centopo aŭ de la provinco, kaj fine la tuta popolo konsistigis origine unu solan grandan markian komunumon por mastrumi la grundon restintan en rekta popolposedo kaj por supera kontrolo de la subaj markioj apartenantaj al ĝia teritorio.

Ŝajnas, ke ankoraŭ ĝis la tempo, dum kiu la franka regno subigis la orientrejnajn Germanion, la centro de la markia komunumo estis en la provinco, ke la provinco entenis la veran markian komunumon. Ĉar nur tiel klariĝas, ke tiom multaj malnovaj grandaj markioj ĉe la oficiala divido de la imperio reaperas kiel juĝejaj provincoj [*Gerichtsgaue*]. Sed jam baldaŭ poste komenciĝis la malestigo de la grandaj markioj. Tamen ankoraŭ en la „imperiestra juro” de la 13-a aŭ 14-a jarcento estas la regulo, ke markio entenas 6 ĝis 12 vilaĝojn.

Tempe de Cezaro almenaŭ granda parto de la germanoj, nome la suevoj, kiu ankoraŭ ne atingis fiksjajn loĝlokojn, prilaboris la kampon komune; tio okazis, kiel ni rajtas supozi laŭ la analogio de aliaj popoloj, en la maniero ke la unuopaj gentoj ampleksantaj nombron da dense parencaj familioj, komune prilaboris la kampon al ili atribuita, kiu estis ĉiujare ŝanĝita, kaj dividis

---

38 Malida vilaĝo: la vilaĝo el kiu devenis la idaj vilaĝoj („gepatraj” vilaĝoj). -v1

la produktojn inter la familioj. Sed kiam ankaŭ la suevoj komence de nia erao en la novaj loĝlokoj definitive hejmiĝis, tiu kutimo baldaŭ ĉesis. Almenaŭ Tacito (150 jarojn post Cezaro) konas jam nur la prilaboradon de la grundo fare de unuopaj familioj. Sed ankaŭ al tiuj la prilaborenda lando estis atribuita nur por unu jaro; post ĉiu jaro ĝi estis alie dividita kaj ŝanĝita.

Kiel tio okazis, tio videblas ankoraŭ hodiaŭ ĉe Mozelo kaj en la *Hochwald* ĉe la tiel nomataj *Gehöferschaften*. Tie oni kunmetas, kvankam ne ĉiujare, sed tamen ĉiujn 3, 6, 9 aŭ 12 jarojn, la tutan kulturatan grundon, kampojn, herbejojn, kaj dividas ĝin laŭ situo kaj grundkvalito en nombron da „*Gewanne*”. Ĉiun *Gewann* oni siavice dividas en kvar egalajn partojn, longajn, mallarĝajn striojn, tiom kiom ekzistas da rajtoj en la komunumo, kaj tiuj estas dividataj al la rajtigitoj per lotumo, tiel ke ĉiu komunumano ricevis en ĉiu *Gewann*, do el ĉiu situo kaj grundkvalito, origine egale grandan pecon. Aktuale la partoj per hereda divido, vendo ktp fariĝis malegalaj, sed la malnova plena parto estas daŭre la unuo, laŭ kiu la duonaj, kvaronaj, okonaj ktp partoj difiniĝas. La nekulturata grundo, arbaroj kaj paŝtejoj, restas komuna posedo por komuna uzado.

Tiu sama praa institucio konserviĝis ĝis komence de nia jarcento [la 19-a] en la tiel nomataj *Losgüter* [„lotumbienoj”] de la bavara rejna Palatio, kies kampa grundo de tiam transiris en privatan proprion de la individuaj komunumanoj. Ankaŭ la *Gehöferschaften* vidas pli kaj pli sian intereson ĉesigi la alidistribuadojn kaj transformi la ŝanĝiĝantan posedon en privatan proprion. Tiel la plej multaj, se ne ĉiuj, formortis en la lastaj kvardek jaroj kaj transiris en ordinaraĵajn vilaĝojn de parcelaj kampkulturistoj kun komuna uzado de arbaroj kaj paŝtejoj.

La unua peco de grundo, kiu transiris en privatan proprion de la unuopulo, estis la domloko. La netuŝeblo de la loĝejo, tiu bazo de ĉia persona libereco, transiris de la tendoĉaro de la migrularo al la trunkodomo de la setlinta kampulo kaj iom post iom transformiĝis en plenan rajton de proprieto je domo kaj korto. Tio estis jam tempe de Tacito okazinta. La hejmo de la libera germano estis certe jam tiam ekskludita el la markio kaj per tio nealirebla por la markia oficisto, do sekura rifuĝejo por rifuĝantoj, tia kia ĝi estis priskribita en la postaj markiaj ordoj kaj parte jam en la popoljuroj de la 5-a ĝis 8-a jarcento. Ĉar la sankteco de la loĝejo ne estis efiko, sed kaŭzo de ĝia transformado en privatan proprion.

Kvar- ĝis kvin-cent jarojn post Tacito ni trovas en la popoljuroj ankaŭ la kulturatan grundon kiel heredan, kvankam ne nepre liberan posedon de la individuaj kampuloj, kiuj havis la rajton disponi pri ĝi per vendo aŭ alia forcedo. Pri la kaŭzoj de tiu transformado ni havas du indikojn.

Unue, dekomence ekzistis en Germanio mem, apud la jam priskribitaj fermitaj vilaĝoj kun kompleta kampkomuneco, ankaŭ vilaĝoj, en kiuj krom la hejmejoj ankaŭ la kampoj estis ekskluditaj el la komunumo, la markio, kaj atribuitaj al la individuaj kampuloj. Sed nur kie la formo de la grundo tion kvazaŭ trudis: en malvastaj valoj, ekz-e en la *Bergisches Land*, sur malvastaj altebenaĵoj inter marĉoj, kiel en Vestfalio. Poste ankaŭ en la montaro *Odenwald* kaj en preskaŭ ĉiuj alpaj valoj. Tie la vilaĝo konsistis, kiel ankoraŭ nun, el disaj unuopaj bienoj, el kiuj ĉiu estis ĉirkaŭata de kampoj; ŝanĝo estis tie ne bone ebla, kaj tiel al la markio restis nur la ĉirkaŭa nekulturata grundo. Kiam poste graviĝis la rajto disponi pri domo kaj korto por forcedo al triaj personoj, tiam tiaj bienposedantoj troviĝis en avantaĝa pozicio. La deziro ankaŭ akiri tiun avantaĝon eble kondukis en kelkaj vilaĝoj kun kampa komuneco al tio, endormigi la kutimajn redistribuadojn kaj per tio igi la individuajn partojn de la komunumanoj ankaŭ heredebaj kaj transigeblaj.

Sed due la konkero de la germanoj atingis romian teritorion, kie de jarcentoj la grundo estis privata proprieto (kaj pli precize roma, ne limigita) kaj kie la malgranda nombro de la konkerantoj ne povis tute forigi tiom enradikiĝintan posedformon. Por la argumento, ke la heredebla privata posedo je kampoj kaj herbejoj estas ligita kun romia juro, almenaŭ sur romia teritorio, pledas ankaŭ la cirkonstanco, ke la ĝis nia tempo konservitaj restaĵoj de la komuna proprieto je kulturebla grundo troviĝas ĝuste sur la maldekstra bordo de Rejno, do sur ankaŭ konkerita, sed *tute germanigita* teritorio. Kiam la frankoj tie setlis en la kvina jarcento, certe ekzistis ĉe ili ankoraŭ kampa komuneco, alie ni ne trovus tie *Gehöferschaften* kaj lotumaj bienoj. Sed ankaŭ tie la privata posedo baldaŭ potence enpenetris, ĉar nur tiun ni trovas, koncerne kultureblan grundon, menciita en la ripuara popoljuro de la sesa jarcento. Kaj en la interno de Germanio la kulturata grundo fariĝis, kiel dirite, ankaŭ baldaŭ privata proprieto.

Sed kvankam la germanaj konkerantoj alprenis la privatan posedon je kampoj kaj herbejoj, t.e. ke ili ĉe la unua divido de grundo aŭ baldaŭ poste

rezignis pri novaj distribuadoj (ĉar temas nur pri tio), ili male enkondukis ĉie sian germanan markian konstitucion kun komuna posedo je arbaroj kaj paŝtejoj kaj kun superregado de la markio ankaŭ pri la distribuita grundo. Tio okazis ne nur ĉe la frankoj en norda Francio kaj la angloj kaj saksoj en Anglio, sed ankaŭ ĉe la burgundoj en orienta Francio, la okcidentaj gotoj<sup>39</sup> en Sudfrancio kaj Hispanio kaj ĉe la orientaj gotoj<sup>40</sup> kaj langobardoj en Italio. En tiuj laste nomitaj landoj tamen, laŭ tio, kion oni konas, ĝis hodiaŭ preskaŭ nur en la alta montaro konserviĝis spuroj de la markiaj institucioj.

La formo, kiun la markia konstitucio alprenis per la rezigno je nova distribuo de la kulturata grundo, estas tiu, kiun ni vidas ne nur en la malnovaj popoljuroj de la 5-a ĝis 8-a jarcento, sed ankaŭ en la anglaj kaj skandinavaĵoj jurlibroj de la mezepoko, en la multnombraj germanaj markiaj ordoj (tiel nomataj *Weistümer*) el la 13-a ĝis 17-a jarcento kaj en la komunrajtoj (*coutumes*) de Nordfrancio.

Per tio, ke la markia komunumo rezignis la rajton de tempo al tempo redistribui la kampojn kaj herbejojn inter la unuopaj komunumanoj, ĝi rezignis eĉ ne pri unu el siaj ceteraj rajtoj. Kaj tiuj rajtoj estis tre gravaj. La komunumo transdonis al la unuopuloj siajn kampojn nur por la celo uzi ilin kiel kampon kaj herbejon kaj por nenia alia celo. Kio estis trans tio, pri tio la individua posedanto havis nenan rajton. En la tero trovitaj valorajoj, kiam ili kuŝis pli profunde ol la plugilo plugas, do ne apartenis al li, sed origine al la komunumo; same la rajto fosi serĉante ercon ktp. Ĉiuj ĉi rajtoj estis poste de la grund- kaj land-sinjoroj akaparitaj por propra utilo.

Sed ankaŭ la uzado de kampoj kaj herbejoj estis ligita al la supera kontrolado kaj regulado fare de la komunumo, kaj pli precize en jena formo. Tie, kie la trikampa ekonomio regis - kaj tio okazis preskaŭ ĉie -, la tuta kamparo de la vilaĝo estis dividita en tri egale grandajn kampojn, el kiuj ĉiu estis alterne destinita en unu jaro por vintra semado, la duan jaron por somera semado, la trian por nekulturado [*Brache*]. La vilaĝo havis do ĉiujare sian vintran kampon, someran kampon kaj nekulturatan kampon. Ĉe la grunddivido oni zorgis pri tio, ke la parto de ĉiu komunumano dividiĝis egale al ĉiuj tri kampoj, tiel ke ĉiu povis sen malavantaĝo plenumi la par-

---

39 Kroma nomo: vizigotoj. -vl

40 Kroma nomo: ostrogotoj. -vl

celan devigon de la komunumo, laŭ kiu li rajtis semi vintran semon nur en sian pecon de vintra kampo ktp.

La respektiva nekulturata kampo estis dum la daŭro de la nekultura stato ree en komuna posedo kaj servis al la tuta komunumo kiel paŝtejo. Kaj ekde kiam la du aliaj kampoj estis pririkoltitaj, ili estis ĝis la tempo de semado ree en komunuma posedo kaj estis uzataj kiel komuna paŝtejo. Same la herbejoj post la dua fojnorikolto de la jaro. Sur ĉiuj kampoj, sur kiuj oni paŝtis, la kampulo devis forigi la barilojn. Tiu tiel nomata paŝtodevigo [*Hutzwang*] kompreneble kondiĉis, ke la difino de la tempo de semado kaj tiu de rikolto ne estis lasita al la unuopulo, sed estis fiksita por ĉiuj same, de la komunumo aŭ per tradicio.

Ĉia cetera grundo, t.e. ĉio, kio ne estis domo kaj korto aŭ distribuita vilaĝa grundo, restis, kiel pratempe, komuna proprieto por komuna uzado: arbaro, paŝtejo, erikejoj, marĉoj, riveroj, lagetoj, lagoj, vojoj kaj vojetoj, ĉasado kaj fiŝkaptado. Kiel la parto de ĉiu komunumano je la dividita grundo estis origine egale granda, tiel ankaŭ lia parto je la uzado de la „komuna markio”. La maniero de ties uzado estis determinata de la tutaĵo de la komunumanoj; same la maniero de disdivido, kiam la ĝis nun kulturata grundo jam ne sufiĉis kaj oni prenis pecon de la komuna markio. La ĉefa uzado de la komuna markio estis brutpaŝtado kaj porka glandonutrado, krome la arbaro liveris konstru- kaj brul-lignon, folian sternaĵon por dombestoj, berojn kaj fungojn; la marĉo, se ĝi ekzistis, torfon. La reguloj pri paŝtado, uzado de ligno ktp konsistigas la ĉefan enhavon de la multaj marki-reguloj<sup>41</sup>, skribitaj en tempo, kiam la malnova, neskribita, tradicia rajto ekfariĝis disputata. La ankoraŭ ekzistantaj komunumaj arbaroj estas la mizera restaĵo de tiuj malnovaj nedividitaj markioj. Alia restaĵo, almenaŭ en okcidenta kaj suda Germanio, estas la ideo profunde enradikiĝinta en la popola konscio, ke la arbaro estas komuna havaĵo, en kiu ĉiu rajtas kolekti florojn, berojn, fungojn, fagonuksojn ktp kaj entute, se li ne kaŭzas damaĝon, rajtas fari kion li volas. Sed ankaŭ tie Bismarko elpaŝas kaj per sia fama berleĝaro adaptas la okcidentajn provincojn al la malnovprusa junkra principo.

Kiel la komunumanoj havis samajn grundpartojn kaj samajn uzrajtojn, ili origine ankaŭ same partoprenis en leĝdonado, administrado kaj juĝado

---

41 Originale: *Markweistümer*. -vl



ene de la markio. Je certaj tempoj kaj pli ofte, kiam necesas, ili kunvenis sub libera ĉielo, por decidi pri la markiaj aferoj kaj ĵugi pri markia misuzo kaj disputoj. Tio estis, kvankam en eta mezuro, la praa germana popolkunveno, kiu estis origine ankaŭ nur granda markia kunveno. Leĝoj estis farataj, kvankam nur en maloftaj urĝaj kazoj; oficistoj estis elektataj, ties laboro kontrolata, sed antaŭ ĉio oni verdiktis. La prezidanto devis nur formuli la demandojn, la juĝo estis trovita de la tutaĵo de la ĉeestantaj komunumanoj.

La markia konstitucio estis en la pratempo preskaŭ la sola konstitucio de tiuj germanaj triboj, kiuj ne havis reĝon; la malnova triba nobelaro, kiu en la popolmigrado aŭ baldaŭ poste pereis, facile adaptiĝis al ĝi, kiel ĉio kune kun tiu konstitucio sponte estiĝinta, kiel la kelta klan-nobelaro ankoraŭ en la 17-a jarcento en la irlandan grundkomunumon. Kaj ĝi tiom enradikiĝis en la tuta vivo de la germanoj, ke ni retrovas ĝian spuron en la evoluhistorio de nia popolo ĉiupaŝe. En la pratempo la tuta publika potenco en paca tempo estis ekskluzive juĝa, kaj tiu troviĝis ĉe la popolkunveno en la centopo, en la regionularo, en la tuta popoltribo. Sed la popoltribunalo estis nur la popola markia tribunalo, aplikata en kazoj, kiuj estis ne nuraj markiaj aferoj, sed tuŝis la publikan potencon. Ankaŭ kiam kun la elformiĝo de la regiona konstitucio la ŝtataj regionaj tribunaloj estis disigitaj disde la ordinara markiaj tribunaloj, restis en ambaŭ la juĝa potenco ĉe la popolo. Nur kiam la malnova popollibereco estis jam forte kadukiĝanta, kaj la tribunala servo apud la armea servo fariĝis prema pezo por la malriĉiĝintaj liberuloj, nur tiam Karlo la Granda povis ĉe la regionaj tribunaloj en la plej multaj regionoj anstataŭigi la popolan tribunalon per juĝistaj tribunaloj.<sup>42</sup> Sed tio tute ne tuŝis la markiajn juĝeojn. Tiuj, male, restis ankoraŭ modeloj por la feŭdaj tribunaloj de la mezepoko; ankaŭ en tiuj la feŭda sinjoro estis nur demandanto, sed trovantoj de la juĝo estis la feŭdaj portantoj mem. La vilaĝa konstitucio estas nur la markia konstitucio de memstara vilaĝa markio kaj transiras en urban konstitucion, ekde kiam la vilaĝo transformiĝas en urbon, t.e. fortikiĝas sin per fosoj kaj muregoj. El tiu origina urbmarkia konstitucio elkreskis ĉiuj postaj urbaj konstitucioj. Kaj fine formiĝis laŭ la markia kon-

42 Ne konfuzu kun la laikaj juĝistaj tribunaloj de Bismarko kaj Leonhardt, kie laikaj juĝistoj kaj [profesiaj] juristoj kune trovas la juĝon. Ĉe la malnova juĝista tribunalo tute ne estis juristoj, la prezidanto aŭ juĝisto tute ne havis voĉon kaj la laikaj juĝistoj trovis la juĝon memstare.

stitucio la ordoj de la sennombraj, ne sur komuna grundposedo baziĝantaj liberaj kooperativoj de la mezepoko, sed speciale de la liberaj gildoj. La rajto atribuita al la gildo je ekskluziva funkciado de certa negoco estas praktikata tute same kiel komuna markio. Kun la sama ĵaluzo kiel tie, ofte per tute samaj rimedoj, oni ankaŭ ĉe la gildoj zorgas pri tio, ke la parto de ĉiu gildano je la komuna uzfonto estu tute aŭ tamen almenaŭ kiom eble plej egala.

La saman preskaŭ mirindan adaptiĝkapablon, kiun la markia konstitucio disvolvis ĉi tie sur la plej diversaj kampoj de la publika vivo kaj vide al la plej diversaj defioj, ĝi pruvas ankaŭ en la plua evoluo de la kampkulturo kaj en la batalo kun la aperanta granda grundproprietulo. La markia konstitucio estis estiĝinta dum la setlado de la germanoj en Germanio, do en epoko, kiam bestbredado estis la ĉefa nutraĵfonto, kaj kiam la el Azio kunportita, duone forgesita kampkulturo nur ĵus reaparis. Ĝi konserviĝis tra la tuta mezepoko en akraj, ofte senĉesaj bataloj kun la grundposeda nobelaro. Sed ĝi estis daŭre tiom necesa, ke ĉie, kie la nobelaro estis alpropriginta al si la kampulan grundon, la konstitucio de la servutaj vilaĝoj restis markia konstitucio, kvankam forte pritrancita per grundsinjoraj intervenoj; ekz-on de tio ni poste mencias. Ĝi adaptiĝis al la ŝanĝiĝantaj posedkondiĉoj de la kulturebla grundo, tiom longe, kiom restis ordinara markio, kaj same al la plej diversaj proprietaĵoj je la komuna markio, ekde kiam tiu ĉesis esti libera. Ĝi pereis per la rabo de preskaŭ la tuta kampula grundo, de la dividita kiel de la nedividita, fare de la nobelaro kaj de la klerikaro kun kompleza helpo de la landa regantaro. Sed ĝi fariĝis ekonomie arĥaika, jam ne vivkapabla kiel funkciĝo de la kampkulturo en la realo nur ekde kiam la gigantaj progresoj de la kampkulturo en la lastaj cent jaroj faris la kampkulturon scienco kaj enkondukis tute novajn mastrumanierojn.

La subfosado de la markia konstitucio komenciĝis jam baldaŭ post la popolmigrado. Kiel reprezentantoj de la popolo la frankaj reĝoj ekposedis la gigantajn, al la tuta popolo apartenantajn grundojn, speciale arbarojn, por fordoni ilin kiel donacojn al sia kortega servantaro, al siaj armegevidantoj, al episkopoj kaj abatoj. Ili fariĝas per tio la kerno de la posta granda grundproprietulo de nobelaro kaj eklezio. Tiu lasta posedis jam longe antaŭ Karlo la Granda plenan trionon de ĉia grundo en Francio; estas certa, ke tiu proporcio validis dum la mezepoko proksimume por la tuta katolika okcidenta

Eŭropo.

La konstantaj internaj kaj eksteraj militoj, kies regula sekvo estis konfiskadoj de grundo, ruinigis grandajn amasojn de kampuloj, tiel ke jam tempe de la merovingoj ekzistis tre multaj liberuloj sen grundposedo. La senĉesaj militoj de Karlo la Granda rompis la ĉefan forton de la libera kampula stato. Origine ĉiu libera grundposedanto estis servodeva kaj devis ne nur armi sin mem, sed ankaŭ nutri sin mem dum ses monatoj de milit-servo. Ne mirige, ke jam tempe de Karlo la Granda apenaŭ ĉiu kvina viro estis vere envicigebla. Sub la ĥaosa administrado de liaj posteuloj la kampula libereco ankoraŭ pli rapide pereis. Unuflanke la mizero pro la normandaj atakoj, la eternaj militoj de la reĝoj kaj militetoj de la granduloj devigis unu liberan kampulon post la alia serĉi por si protektan sinjoron. Aliflanke la avido de tiuj samaj granduloj kaj de la eklezio rapidigis tiun procezon; per ruzo, promesoj, minacoj, perforto ili venigis ankoraŭ pli da kampuloj kaj kampulan grundon sub sian potencon. En unu kiel en la alia kazo la kampula grundo estis ŝanĝita en sinjoran grundon kaj estis, se entute, redonita al la kampulo por uzado kontraŭ interezoj kaj servuto. Sed la kampulo estis el libera grundposedanto transformita en interezpagantan kaj por la sinjoro laborantan dependulon aŭ eĉ servutulon apartenantan al la sinjoro. En la vestfalia regno, entute okcidente de Rejno, tio estis la regulo, oriente de Rejno ankoraŭ konserviĝis iom granda nombro de liberaj kampuloj, plej ofte disaj, malofte kunaj en tutaj liberaj vilaĝoj. Sed ankaŭ tie en la 10-a ĝis 12-a jarcento la granda potenco de la nobelaro kaj de la eklezio premis ĉiam pli da kampuloj en la servuton.

Kiam bona sinjoro - ĉu eklezia aŭ ne - akiris kampulan bienon, tiam li akiris per tio ankaŭ la al la bieno apartenantan justecon en la markio. La novaj grundsinjoroj tiel fariĝis markianoj, origine ene de la markio nur samrangaj kun la ceteraj liberaj kaj servutaj markianoj, eĉ kun siaj propraj servutuloj. Sed baldaŭ ili akiris, spite al tenaca rezistado de la kampuloj, en multaj lokoj privilegiojn en la markio kaj ofte povis eĉ submeti la markion al sia grundregado. Kaj tamen la malnova markia komunumo daŭris, kvankam sub la sinjora kuratoreco.

Kiom neeviteble necesa la markia konstitucio tiam estis ankoraŭ por la kampkulturo, eĉ por la granda grundposedo, plej frape pruvas la koloniigo de Brandenburgio kaj Silezio fare de frisaj, nederlandaj, saksaj kaj rejn-

frankaj setlantoj. Tiuj homoj estis tie, ekde la 12-a jarcento, vilaĝope setligitaj, laŭ germana juro, t.e. laŭ la malnova markia juro, tiom kiom ĝi estis konservita sur sinjoraj bienoj. Ĉiu ricevis domon kaj korton, certan por ĉiuj same grandan parton de la vilaĝa grundo kaj la uzrajton je arbaro kaj paŝtejo, plej ofte en sinjora arbaro, malofte en aparta markio. Ĉio ĉi estis hereda; la grundproprietulo restis al la sinjoro, al kiu la koloniantoj ŝuldis certajn interezojn kaj servojn. Sed tiuj devoj estis tiom malgrandaj, ke la situacio de la kampuloj estis tie pli bona ol ie ajn en Germanio. Pro tio ili restis ankaŭ trankvilaj, kiam la kampulumilito eksplodis. Pro tiu rifuzo je sia propraj interesoj ili estis poste akre punitaj.

Entute ĉirkaŭ la mezo de la 13-a jarcento okazis decida ŝanĝo favore al la kampuloj, sekve al la krucmilitoj. Multaj grundsinjoroj forirantaj al krucmilito eksplicite liberigis siajn kampulojn. Aliaj mortis, centoj da nobelaj familioj malaperis, kies kampuloj ankaŭ ofte akiris la liberecon. Nun aldoniĝis, ke kun la kreskantaj bezonoj de la grundsinjoroj la komando super la produktoj de la kampuloj fariĝis multe pli grava ol tiu super iliaj personoj. La servuteco de la frua mezepoko, kiu havis en si ankoraŭ multon de la malnova sklavismo, donis al la sinjoroj rajtojn, kiuj pli kaj pli perdis sian valoron; ĝi iom post iom endormiĝis, la pozicio de la servutuloj proksimiĝis al tiu de la nur dependaj homoj. Ĉar la funkciado de la kampkulturo restis tute la malnova, tial pliigo de la biensinjoraj enspezoj atingeblis nur per plugado de novaj terenoj, konstruado de novaj vilaĝoj. Sed tio eblis nur per bona interkonsento kun la koloniantoj, egale ĉu ili estis dependaj de la grundsinjoro aŭ ĉu ili estis fremduloj. Pro tio ni trovas el tiu tempo ĉie precizan fiksadon de la kampulaj, plej ofte ne altaj devoj kaj bonan traktadon de la kampuloj, speciale sur la bienoj de la klerikaro. Kaj fine efikis la favora pozicio de la nove alvenintaj koloniantoj al la situacio de la najbaraj dependuloj, tiel ke ankaŭ tiuj en tuta norda Germanio ĉe daŭrigo de siaj devoj por la grundsinjoro ricevis sian personan liberecon. Nur la slavaj kaj litovaj-prusaj kampuloj restis neliberaj. Sed tio ne daŭris longe.

En la 14-a kaj 15-a jarcentoj la urboj rapide evoluis kaj riĉiĝis. Ilia armetio kaj lukso floris speciale en Sudgermanio kaj ĉe Rejno. La riĉeco de la urba patricio ne lasis la krude nutratan, krude vestitan, maldelikate meblitan junkron trankvile dormi. Sed de kie ricevi la belaĵojn? La ĉevoja rabado fariĝis ĉiam pli danĝera kaj pli sensukcesa. Sed por aĉeti necesis mono. Kaj

tion povis provizi nur la kampulo. Pro tio denova premo sur la kampulojn, kreskantaj interezoj kaj servutaj servoj, renovigita, ĉiam pli rapida fervoro premi la liberajn kampulojn en staton de dependuloj, la dependulojn en tiun de servutuloj kaj transformi la tutan markian grundon en sinjoran grundon. Por tio al la grundsinjoroj kaj nobeloj helpis la romaj juristoj, kiuj per sia aplikado de romaj juraj principoj al germanaj, plej ofte nekomprenataj kondiĉoj sciis estigi senliman konfuzon, tamen ja tiel, ke la sinjoro ĉe tio ĉiam gajnis kaj la kampulo ĉiam perdis. La ekleziaj sinjoroj helpis sin pli simple: Ili falsis dokumentojn, en kiuj la rajtoj de la kampuloj fariĝis pritrancitaj kaj iliaj devoj pliigitaj. Kontraŭ tiuj rabadoj fare de grundsinjoroj, nobeloj kaj pastroj la kampuloj ekde la fino de la 15-a jarcento leviĝis en tre oftaj unuopaj ribeloj, ĝis kiam en 1525 la granda kampulmilito inundis Ŝvabion, Bavarion, Frankonion ĝis Alzaco, Palatino, la reĝna regiono kaj Turingio. La kampuloj subiĝis post akraj bataloj. De tiam datiĝas la denova ĝenerala dominado de servuto inter la germanaj kampuloj. En la regionoj, kie la batalo furiozis, nun ĉiuj ankoraŭ restintaj rajtoj de la kampuloj estis senhonte distretitaj, ilia komunuma grundo transformita en sinjoran grundon, ili mem en servutulojn. Kaj kiel danko por tio, ke la pli bonstatataj nordgermanaj kampuloj restis trankvilaj, ili subiĝis, nur pli malrapide, al la sama subpremo. La servuto de germanaj kampuloj enkondukiĝis en Orientprusio, Pomeranio, Brandenburgio, Silezio ekde la mezo, en Ŝlesvig-Holŝtejno ekde la fino de la 16-a jarcento kaj estis ĉiam pli ĝenerale trudita al la kampuloj.

Tiu nova perforto havis krome ekonomian kialon. El la bataloj de la reformacia tempo nur la germanaj landaj princoj gajnis pli da povo. Estis la fino de la nobla rab-metio de la nobelaro. Se ĝi ne volis pereji, ĝi devis el sia grundposedo estigi pli da enspezo. Sed la sola vojo por tio estis tiu, laŭ la modelo de la pli grandaj grundsinjoroj kaj speciale de la monaĥejoj, mastrumi almenaŭ parton de tiu posedo por propra konto. Kio ĝis nun estis nur escepto, tio fariĝis nun bezono. Sed al tiu nova mastrummaniero malhelpis la fakto, ke la grundo estis preskaŭ ĉie distribuita al la interezon pagantaj kampuloj. Per transformado de la liberaj aŭ dependaj kampuloj en plenan servutecon, la sinjora moŝto ricevis liberecon agi. Parto de la kampuloj estis, kiel la arta esprimo diras, „kuŝigitaj”<sup>43</sup>, t.e. forpelitaj aŭ degraditaj al

---

43 Originale: „gelegt”, „kuŝigita”, la speciala esprimo por ĝuste tiu metodo senrajt-

„Kotsasse”, kiu konservis nur kabanon kaj iomete da ĝardeno, iliaj bienoj kunmetitaj al granda sinjora bieno kaj prilaborataj de la novaj *Kotsassen* kaj de la restintaj kampuloj en servuta servo. Per tio ne nur multaj kampuloj estis elpelitaj, sed la servutaj servoj de la ceteraj ankoraŭ konsiderinde pliigitaj, kaj tio ĉiam pli. La kapitalisma periodo anonciĝis en la kamparo kiel periodo de la kampara grandentreprenejo surbaze de servuta laboro.

Tiu transformado okazis tamen komence sufiĉe malrapide. Jen venis la Tridekjara Milito. Dum la tempo de tuta generacio Germanio estis trairata de la plej senbrida soldataĉaro, kiun la historio konas. Ĉie ili krimbruligis, rabadis, kaj homojn bruligis, seksperfortis, murdis. La kampulo suferis pleje tie, kie flanke de la grandaj armeoj malgrandaj militistaj aŭ pli ĝuste rabistaj grupoj proprainiciate kaj proprakonte agis. La detruado kaj senpopoligo estis senlima. Kiam la paco venis, Germanio kuŝis tere senhelpa, distretita, dispecigita, sanga; sed plej mizera estis ree la kampulo.

La grundposeda nobelaro estis nun sola reganto en la kamparo. La princoj, kiuj en la urboj ĝuste tiam neniigis ĝiajn politikajn rajtojn, lasis al ĝi kompanse liberan manon kontraŭ la kampuloj. Sed la lasta rezistkapablo de la kampuloj estis de la milito rompita. Tiel la nobelaro povis aranĝi ĉiujn kamparajn kondiĉojn laŭ sia konveno. Ne nur la forlasitaj kampulaj bienoj estis simple unuigitaj kun la sinjora bieno; la „kuŝigado” de la kampuloj estis nun farata grandskale kaj sisteme. Ju pli grandis la sinjora bieno, des pli grandis kompreneble la servutaj servoj de la kampuloj. La tempo de la „nemezurataj servoj” rekomencis; la sinjora moŝto povis komandi la kampulon, lian familion, lian brutaron al laboro tiom ofte kaj tiom longe kiom plaĉis al li. La servuteco fariĝis nun ĝenerala; libera kampulo estis nun same malofta kiel blanka korvo. Kaj por ke la sinjora moŝto estu kapabla sufoki jam en la ĝermo ĉian, eĉ la plej etan reziston de la kampuloj, li ricevis de la landa princo la „patrimonian juĝrajton”, t.e. li estis nomumita la sola juĝisto por ĉiaj malgrandaj deliktoj kaj disputoj de la kampuloj, eĉ se kampulo estis en disputo kun li, la sinjoro, do tiam la sinjoro estis juĝisto en propra afero! Ekde tiam regis en la kamparo bastono kaj vipo. Kiel la tuta Germanio, tiel la germana kampulo estis alveninta ĉe sia plej profunda humiliĝo. Kiel la tuta Germanio, tiel ankaŭ la kampulo fariĝis tiom senforta, ke ĝi tute ne povis helpi sin mem, ke savo povis veni nur deekstere.

---

igi la kampulojn en tiu tempo. -vI

Kaj ĝi venis. Kun la franca revolucio ankaŭ por Germanio kaj la germana kampulo venis la matena krepusko de pli bona epoko. Apenaŭ la revoluciaj armeoj konkeris la maldekstran bordon de Rejno, jam tie malaperis la tuta malnova fatraso de servutaj servoj, interezo, ĉiaj tributoj al la sinjora moŝto, kune kun li mem, kvazaŭ per sorĉilo. La kampulo maldekstre de Rejno estis nun reganto de sia posedaĵo kaj ricevis krome la „*Code civil*”, leĝaron, konceptitan de la revolucio, kaj de Napoleono nur fuŝitan, kaj kiu estis adaptita al lia nova situacio kaj kiun li povis ne nur kompreni, sed ankaŭ komforte porti kun si en la poŝo.

Sed la kampulo dekstre de Rejno devis atendi ankoraŭ longan tempon. Estas vere, ke en Prusio, post la meritita malvenko ĉe Jenao, kelkaj el la plej hontaj nobelaj privilegioj estis forigitaj kaj la tiel nomata kvitigo de la ceteraj kampulaj devoj ebligita. Sed tio staris plejgrandparte kaj dum longa tempo nur sur la papero. En la ceteraj ŝtatoj de Germanio okazis eĉ malpli. Necesis dua franca revolucio en 1930 por antaŭenigi tiun kvitigon almenaŭ en Badeno kaj en kelkaj ceteraj ŝtatoj najbaraj al Francio. Kaj kiam la tria franca revolucio 1848 kuntrenis fine ankaŭ Germanion, tiam la kvitigo estis en Prusio ankoraŭ tute ne kompleta kaj en Bavario eĉ ankoraŭ ne komencita! Sed nun la afero okazis pli rapide, la servuta laboro, de la nun mem ribelantaj kampuloj estis perdinta ĉian valoron.

Kaj en kio konsistis tiu kvitigo? Pro tio, ke la sinjora moŝto cedis certan sumon de mono aŭ pecon da grundo al la kampulo, tiu devis pro tio agnoski la ceteran grundon de la kampulo restintan al la sinjoro kiel la liberan, senŝarĝan proprieton de la sinjoro - kvankam ĉiuj grundoj jam pli frue apartenantaj al la sinjora moŝto estis nenio alia ol ŝtelita kampula grundo! Sed krome, dum la diskuto kaj disputo la oficistoj taskitaj pri tio kompreneble preskaŭ regule kompleksis la sinjoran moŝton, ĉe kiu ili loĝis kaj drinkis, tiel ke la kampuloj eĉ kontraŭ la teksto de la leĝo estis ankoraŭ kolose malavantaĝitaj.

Kaj tiel ni alvenis fine, danke al tri francaj revolucioj kaj unu germana, al la situacio, ke ni havas ree liberajn kampulojn. Sed kiom nia hodiaŭa libera kampulo postrestas al la libera markiano de la malnova tempo! Lia bieno estas plej ofte multe pli malgranda, kaj la nedividita markio estas for, escepte de malmultaj, tre malgrandigitaj kaj ne flegitaj komunumaj arbaroj. Sed sen uzado de markio, nenia brutaro por la etkampulo, sen brutaro nenia

sterkaĵo, sen sterkaĵo nenia racia kampkulturo. La impostkolektisto kaj malantaŭ tiu la minacanta ekzekuciisto, kiujn la nuntempa kampulo tro bone konas, estis tute nekonataj al la malnovaj markianoj, same kiel la hipoteka uzuristo, kies ungegoj akaparas unu kampulan bienon post la alia. Kaj plej absurde: Tiuj novaj liberaj kampuloj, kies bienoj kaj kies flugiloj estis tiom pritrancitaj, estis kreitaj en Germanio, kie ĉio okazas tro malfrue, en momento, en kiu ne nur la scienca kampkulturo, sed ankaŭ jam la nove inventitaj kampkulturaj maŝinoj igas la etentreprenon pli kaj pli arĥaiginta, jam ne vivkapabla produktadmaniero. Kiel la meĥanikaj ŝpino kaj teksejo la ŝpinradon kaj la manteksilon, tiel tiuj novaj kampkulturaj produktadmetodoj devas sensave neniigi la kampkulturan parcelan mastrumadon kaj anstataŭigi ĝin per la granda grundproprietulo, se - oni lasas al ili la necesan tempon.

Ĉar jam minacas al la tuta eŭropa kampkulturo, kia ĝi hodiaŭ estas praktikata, superpotenca konkurencanto en la usona amasproduktado de greno. Kontraŭ tiu grundo, kiun la naturo mem igis prilaborebla kaj fekundigis por longaj jaroj, kiu haveblas per ridinde malmulta mono, nek niaj enŝuldiĝintaj etkampuloj nek niaj same profunde enŝuldiĝintaj grandaj grundproprietuloj povas konkurenci. La tuta eŭropa kampkultura entreprenmaniero malvenkas antaŭ la usona konkurenco. Kampkulturo en Eŭropo restas ebla nur, se ĝi estas praktikata socie kaj por konto de la socio.

Jen la ekspektoj por niaj kampuloj. Kaj la estigo de, kvankam kripole, libera kampula klaso havis *tion* bonan, ke ĝi metis la kampulon en situacion, en kiu li - kun la helpo de liaj naturaj aliancanoj, la laboristoj - povas helpi sin mem, ekde kiam li nur volas kompreni, *kiel*.<sup>44</sup>

\*

Sed kiel? - Per renaskiĝo de la markio, sed ne en ĝia malnova, arĥaika, sed en noviĝinta formo; per tia novigo de la grunda komunumo, ke tiu donas al la etkampulaj kooperativaj membroj ne nur ĉiujn avantaĝojn de la granda entrepreno kaj de la apliko de la kampkultura maŝinaro, sed al ili ankaŭ la rimedojn por praktiki apud la kampkulturo grandan industrion per vapor- aŭ akvo-forto, kaj tio por konto ne de kapitalistoj, sed de la kooperativo.

---

44 La sekvan parton Engelso aldonis en la jaro 1883 en la kampa flugfolio. -mew



## Frederiko Engelso: La markio

Grandskala kampkulturo kaj uzado de kampkultura maŝinaro - tio signifas alivorte: superfluigon de la kampkultura laboro de la plej multaj etkampuloj, kiuj nun prilaboras siajn kampojn mem. Por ke tiuj homoj, kiuj en la kampkulturo fariĝis superfluaj, ne restu senlaboraj aŭ devu iri en la urbojn, necesas industria laboro en la kamparo mem, kaj tiu estas avantaĝe farebla nur grandskale, per vapor- aŭ per akvo-forto.

Kiel tion aranĝi? Pri tio iom pensu, germanaj kampuloj. Kiu sole povas helpi vin ĉe tio, tio estas - la socialdemokratoj.

# Notoj de la tradukinto

Tiu ĉi teksto havas tri grandajn kvalitojn - krom tiun, esti entute teksto de unu el la „fondintoj” de la marksismo -, pro kiuj ĝi meritas aperon en nia lingvo.

Unue ĝi estas unu el la lastaj tekstoj - Engelso reviziis kaj kompletigis ĝin en la jaro 1891 -, en kiuj la aŭtoro esprimis sin pri la rolo de la ŝtato en la tiam moderna kapitalismo (kiu jam elformis monopolojn) kaj en la socio dum kaj post la proletara revolucio. Ĝi estas do aparte interesa por la pozicio de la „klasikuloj” pri tiu demando, kompare kun la „Manifesto de la Komunista Partio” el la jaro 1848 (verkita en 1847).

Due ĝi estas verkita, fakte reviziita, provizita per aldonaĵoj, ne por sciencistoj kaj teoriuloj, sed por esti kiom eble plej facile komprenebla por germanaj laboristoj.

Kaj trie, ĝi estas kvazaŭ mallonga resumo de la tuta laboro de la duopo Markso kaj Engelso, klarigita en ĝia historia evoluo ekde la grandaj francaj kaj anglaj utopiaj socialistoj.

Pro tio (sed ne nur pro tio!) ĝi certe povas esti utila en aktualaj politikaj diskutoj inter nialingvanoj.

La traduko entenas ie kaj tie en la teksto klarigojn de la tradukinto; tiuj estas ĉiam inter rektaj krampoj.

Aliaj klarigoj de la tradukinto troviĝas en piednotoj. Piednotaj rimarkoj faritaj de la tradukinto estas signitaj per lia signo: -vI; piednotoj de la aŭtoro ne estas aparte markitaj, sed tiuj de la germana eldonejo estas markitaj per la siglo -mew.

Fontindikoj estas faritaj piednote. Por tiaj fontindikoj, kiuj referencas librojn aperintajn ĉe MAS, la referenco en la piednoto ne estas kompleta, sed ĝi resendas per listonumero al la plena referenco en la librofina listo de ĉe MAS eldonitaj libroj (paĝoj 67 ĝis 72 de tiu ĉi libro), kie ĝi tiel estas facile konsultebla.

*Pedro Betancourt, en januaro 2012*

*Vilhelmo Lutermano*

## Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera -- volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado - ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj - jen en la vico de ilia apero:

**1. - C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

**2. - Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

**3. - Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

**4. - Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

**5. - GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

**6. - Johano Besada: Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

**7. - [Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

**8. - Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

**9. - Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949**, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

**10. - Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Poitikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** - trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

**11. - Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS,

2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

**12. - Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

**13. - Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

**14. - Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

**15. - Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio.** Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

**16. - Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj.** François Jullien: Ĉinscienco en saktrato - Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

**17. - Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

**18. - Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo - Analizoj n-ro 1**, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo - pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono - kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobriĝado - Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

**19. - Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo - La Kuba Kvinopo, Howard Zinn:** La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono - preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass :** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj - kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin -pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amas-komunikiloj kaŝas - la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

**20. - Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo.** Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al

Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-91830

**21. - Oktobra Revolucio kaj la sekvoj.** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetosocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

**22. - Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2,** Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermand: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio - respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

**23. - La homo kaj lia naturo - La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj.** Lucien Sève: Ĉu la homo? - La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj - Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsihosocia unuo homo - kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

**24. - Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

**25. Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj,** elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

**26. - Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

**27. - Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”,** tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

**28. - Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomi-krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

**29. - Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko - Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kōlsch: Kubo - Heinz Dieterich - kontraŭeeco; Otto Meyer: Teologio de liberigo - ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

**30. - Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako,** MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-20-5

**31. - Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo.** Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

**32. - Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo,** Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

**33. - Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj**

**hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. - **Maritza Gutiérrez: José Martí - de kie kreskas la palmo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. - **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. - **Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakís kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO<sub>2</sub>-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okazaĵo; raportoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

37. - **Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. - **Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. - **Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. - **Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino**, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. - **Jozefo Ŝejfštejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. - **Ivan Efremov: La Horo de Bovo**. Sciencifika romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. - **Roger Martelli: La komunismo estas bona partio - diru al ĝi JES**, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

44. - **Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo**. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

45. - **Miriam Rodríguez: ALVERA: Desegni la parkon**, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

46. - **Kien Afriko en la 21-a jarcento? Le Monde diplomatique en Esperanto**, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

47. - **Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

48. - **Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

49. - **Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo - Kritiko de la Wertkritik**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

50. - V. I. Lenin: **Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

51. - Unuiĝintaj Nacioj: **Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migrantaj laboristoj kaj de iliaj familianoj.** Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

52. - Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: **Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo,** komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

53. - Karlo Markso: **La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

54. **Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn,** tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

55. **Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno,** elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

56. **Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300.48-9

57. **Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominternio en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick,** elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. **José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto),** Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. **Ekonomia krizo n-ro 4.** Joachim Becker: EU - de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. **Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj.** Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. **V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo;** Anarĥismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo”; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. **Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciigo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP,** kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

- 63. Lode Van de Velde: Epizodoj**, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7
- 64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro**, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4
- 65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1
- 66. Roberto Ŝteĝervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8
- 67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo**. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1
- 68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5
- 69. Kien la klimato? N-ro 2**, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8
- 70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)
- 71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj**, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2
- 72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9
- 73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietingter: La miskompreno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7
- 74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6 (tiu ĉi libro)
- 75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” kompakte**, [resumo de la 3 volumoj de „La kapitalo” de Karlo Markso], elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4
- 76. Ivan Efremov: Tais el Ateno**, tradukis el la rusa Jurij Finkel, MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1





Frederiko Engelso:  
La evoluo de la socialismo de utopio al scienco  
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano  
Monda Asembleo Socia (MAS)  
2012  
ISBN 978-2-918300-65-6

Enpaĝigita de MAS per LibreOffice 3.4.3 kaj litertiparo Liberation Serif 10  
kaj 9 pts, sub Mandriva Linukso 2011  
presita en Germanio en la jaro 2012